Police Officers of various nations, and among them some of very high standing, have signified their intention to attend the “Tenth” in Paris, and to take part in the Police Conference to be held in connection with the Congress. M. Hennion, Prefect of Police, much impressed by the wonderful results attending the use of Esperanto by the police of various countries, is giving his cordial support to the Esperanto movement in his prefecture.

The Sixth Belgium Esperantists' Congress will take place at Mechelen on May 31 and June 1, under the presidency of S-ro Van Petegem. The main functions will be the official reception in the Town Hall, general meeting of the *Belga Ligo*, banquet, and dramatic evening. The following plays will be presented:—*Hejma Paco*, by Courteline, tr. S-ro Schoofs; *Angla Lingvo sen Profesoro*, by Tristan Bernard; *Bietje*, by Maurits Sabbe, tr. D-ro W. Van der Biest. On the second day there will be an excursion to Willebroeck, with a visit to the De Nayer paper mills, and in the evening a fine bell concert by the famous artist, S-ro Denyn.

Value Received.—The average man when he puts half a dollar in the missionary box is content with the fact that he is doing something to help enlighten the heathen. He is not looking for a gilt-edged Bible, a year's subscription to the *Missionary Herald*, and a ticket to the Church entertainment as premiums. The work of EANA is much the same as that of any mission—spreading information among the unenlightened and giving them an opportunity to learn what Esperanto is. The question should not be “What am I getting out of the Association?” but rather “What am I doing for it?”—From *Amerika Esperantisto*.

[Same here.—Ed., B.E.].

CHRONICLE.

Matter for the Chronicle should be sent to the Editor not later than the 15th of the month, for insertion in the following number. Reports may be in English. Matter for "Coming Events" (which should be as concise as possible) may be sent in up till the 20th. Secretaries, please note New Address: 17, Hart-street, London, W.C.

COMING EVENTS.

Buckhurst Hill.—La grupo invitas la gesamideanojn partopreni sian vagadon en Epping Forest, Majo la 16an. Gvidontoj atendos ĝis 3h.15 ĉe Chingford Station por vagonaroj, kaj ĉe la "Warren Wood" Hotelo, Epping Forest, por omnibusoj. La aroj unuiĝos ĉe la sud-orienta angulo de Connaught Waters, apud Ranger's-road, por kunvagadi ĝis Sawyers' Retreat, High Beech. Temango po 9 pencej je 5h.15.

P.k. antaŭe sendita de partoprenontoj dankemigos la hon. sekretarion, F-inon Stacy, *Woodthorpe, Buckhurst Hill.*

Vagonaro de Liverpool St. 2h.38 atingas Chingford 3h.7.

Omnibusoj N-roj. 38a, Victoria Station, al Warren Wood (vojaĝo okupas 1 horo 34 min.). 157, Camden Town, al High Beech, ankaŭ preterpasas Warren Wood, kaj preskaŭ atingas la temangejon.

Esperanta Diservo okazos en Harecourt Church, St. Paul's-road, Canonbury, N., je 3.15, Dimanĉon, la 10an de Majo. Teo estos ricevebla poste ĉe 4, Holloway-road.

Esperanta Stenografio.—Aldone al la informoj en la lasta numero de B.E., mi povas aldoni jenajn detalojn. Kursoj (de sep lecionoj entute) okazos Lundvespere en Queen's-road Instituto, Dalston, kaj Merkredvespere en Haverstock Hill Instituto, Chalk Farm, en la sep semajnoj sekvantaj Pentekoston. Oni instruos Lunde per Esperanto, kaj Merkrede per angla lingvo. La honorario por la kurso estos 2s., kaj laŭvole studentoj povos ĉeesti ambaŭ kursojn sen ekstra pago. Oni aranĝos por jaŭdvesperoj diktadon ekzerciĝon bazitan sur la lecionoj ricevitaj.

Ciu, kiu intencas aniĝi, estas petata sciigi al mi sian nomon.—M. C. BUTLER, 18, Leigh-road, Highbury.

Greenwich (Sud-Orienta Stelo).—This group is arranging an excursion on June 6 to Chislehurst Caves. Tea at 5. *Venu amase.*

Hyde Park.—GRANDA MALFERMA KUNVENO de la Hyde Park propagando okazos Sabaton, Majo 2an (vespere je la 7a—10a). Ciuj samideanoj estas petataj fari sian eblon ĉeesti!

Londonaj Samideanoj! bonvolu noti, ke la propagandaj kunvenoj nun rekomenciĝas en Hyde Park. Tiu ĉi parko prezantas al la Esperantistoj bonegan reklamejon, sur kiu ni povas puŝi nian aferon rekte al la atento de la generala publiko, kiu plejparte neniel povas alimaniere sciigi pri Esperanto. Ni ne rajtas kredi, ke homoj faros grandajn penojn kaj geniajn "Sherlock-Holmes"-ajojn (necesajn en multaj okazoj) por elfosi Esperantistojn. Dum la pasinta jaro ni havis centojn da tre grandaj kunvenoj plejparte simpatiaj al nia propagando; multaj libroj vendigis ĉiusemajne; Esperanto estis predikata al multaj miloj da homoj, kaj niaj dimanĉaj "predikoj" fariĝis Londona Interesajo. Mi bedaŭras diri, ke tiuj kunvenoj ne estis ĉiam sufiĉe subtentaj de la samideanoj mem; do la laboro falis sur la ŝultrojn de nemulte da fervoruloj, kiuj eluzis siajn fortojn kaj ruinigis siajn voĉojn pro la bono de Esperanto. Duhora parolado estis ofta okazajo pro manko de helpantoj, kaj mi mem dum unu Sabata vespero tutsole reprezentis la grandan Aferon kaj parolis KVAR HOROJN senripoze. Do mi tre petas ke multaj samideanoj venu helpi nin sukcesigi la entreprenon.—W. H. BROWNE.

Similaj kunvenoj okazos ankaŭ en Battersea Park kaj sur Clapham Common.

How Esperanto is Used.—The March Report of the Esperanto Consul for London, presented at the monthly meeting of London Delegates of the U.E.A., showed how Esperanto is being increasingly used by business men and others.

To date 211 persons had joined the U.E.A., as compared with 155 for the same period last year, which proves that despite the doubling of subscription the U.E.A. is quickly getting back to its former large membership.

The Consul reported that he had succeeded in interesting two London firms in Esperanto. One of them, CAREW & CAREW, Tailors, has not only become an *Entrepreno*, but has issued circulars and almanacs in Esperanto, and inserted an advertisement in THE BRITISH ESPERANTIST. The other firm, W. DRAKE & Co., LTD., are the well-known mercers, and, having given their shirt the Esperanto name of "Progreso," they are seeking a new clientele amongst Esperantists.

During the month he had rendered 26 services of various kinds, of which the following is a selection:—

Essential Oils.—A North African firm wishes to export Essential Oils, and requested addresses of large English users. Negotiations are now proceeding.

Kinematography.—The Russian Government is collecting information from all countries regarding laws pertaining to Kinematograph Theatres (taxes, conditions, etc.). Full details were sent, as well as a copy of the English law.

Lost Persons.—The niece of Mme. Janota, a famous Polish Court pianiste, desired the present address of this lady, who has been performing in London. After considerable difficulty the address was found.

A Pole came to London about 25 years ago, and his present address is being sought, but as the only clue sent was his name, that was not sufficient to trace him.

From Austria came a request to discover the present address of a Professor of Astronomy, who came to London from Darlington, and also to find out his opinion of a certain method of astrology. The Consul discovered that he had been dead for some time, but could obtain no information with regard to his opinions.

Sweetmeats.—A French Esperantist wishes to obtain the address of the manufacturer of a certain sweetmeat for smokers, and the Consul got into touch with several firms.

Text-Books.—An Austrian desired the address of publishers of the *Encyclopædia Britannica*, and of various text-books for primary and secondary schools. These were sent.—H.A.E.

Esperanto and Engineers.—A copy of the paper upon Esperanto read by Mr. T. J. Gueritte, B.Sc., M.Soc., C.E. (France), before the Society of Engineers, with a full report of the discussion (24 pp.), may be had by sending a penny stamp to the B.E.A. for postage.

LONDON.

Anerley.—In order to keep up the interest of the members of the very successful class held here during the past winter, it has been decided to hold meetings for conversational practice during the summer at 19a, Oakfield-road, Anerley, every alternate Wednesday, from 8—10 in the evening. The first meeting will take place on Wednesday, May 6. Any Esperantist, beginner or advanced, will be cordially welcomed.

London Club.—About ninety *samideanoj* and friends gathered together for the "Conversazione," which took place on March 13. Colonel Pollen kindly acted as chairman, and Mr. Mudie gave an excellent propaganda speech. The presence of two such *samideanoj* at a meeting is always a guarantee of success! Miss Yorke and Miss Carew (contralto) charmed all by their beautiful singing, and the audience insisted that Miss

Rosa Maude—ever a favourite—should give an encore. Among other items, Mr. Browne gave a good and very amusing illustration of Esperanto propaganda in Hyde Park and other places; Miss Grant and Miss Wynter gave a dialogue, "Breakage," which showed up the great difficulties foreigners have in learning English. After a conversation interval and supper, the evening was closed with a few dances.—J.W.

Sutton.—La loka societo havis bonan okazon por propagando ĉe granda ekspozicio aranĝita de la Sutton Boy Scouts' Association en Sutton Publiko Halo; ĉirkaŭ la halo estis budoj, ĉiu reprezentanta specialan flankon de laboro farita de la knaboj skoltoj; ĉe la pordo estis la "Interpretista" budo, ĉe kiu prezidis la sekretario de la Esperanta Societo; sur la muro vidigis anoncoj "Tie ĉi oni parolas Esperanton," kaj grandan Esperantan standardon; la tablo (8 x 3 futoj) estis kovrata per Esperantaj libroj ĉiuspecaj; ses knaboj (âgaj 10—17) el la Skolta trupo 9a de Sutton montris Esperantajn tradukojn. Entute, disdonigis ĉirkaŭ 900 folietoj pri Esperanto, ankaŭ vendigis kaj disdonigis ekzempleroj de *Esperanto for All, Home Student*, k.c. Ĉe la budo por aviado, ingeniiero, elektro kaj metal-laboro, prezidis la help-sekretario de la Esperantista Societo, kaj tie ankaŭ vidigis anonco "Oni parolas Esperanton." La ekspozicio daŭris du tagojn (27an kaj 30an de Marto) kaj trapasis ĉirkaŭ 1,200 personojn. Jam montriĝis kelkaj rezultatoj; pli da skoltoj deziras lerni la lingvon, kaj almenaŭ unu skoltestro promesis provi instrui la lingvon.

Wood Green.—Por ricevi pli taŭgan kaj pli belan kunveno-ĉambron, la ĉitea grupo—per "referendum" je ĉiuj anoj—decidis ŝangi la kunvenadvesperon. Post la Ĉiujara Afera Kunveno, kiu okazos Sabaton, la 9an de Majo, la grupo kunvenados *ciujajde* je la 7.30 gis la 9.30 en la malsupra ĉambro ĉe la Wood Green'a Publiko Biblioteko. Tie la anoj kore bonvenigos ĉiun samideanan aŭ scivoleman vizitanton, en la daŭro de la tuta jaro.

THE PROVINCES.

Burnley.—Nia ĉiujara kunveno okazis komence de Aprilo, kaj la diversaj oficistoj prezantis sufice kontenti-gajn raportojn rilate al la jus-pasinta jaro. La anoj vigle diskutis multajn temojn, kaj kelkaj ŝanĝetoj okazis en la vicoj de la oficistoj. Mi gojas anonsi, ke S-ro Currie ankoraŭ estas la estimata prezidanto. Sed bonvole notu ke la nuna korespondada sekretario estas S-ro H. Toms, 148, Branch-road, Burnley.

Bexhill-on-Sea.—A most successful gathering took place here on April 22. About 30 Esperanto friends came from Hastings and Eastbourne, and after tea with the local Esperantists, an entertainment was given in the Pavilion, Egerton Park, at 7 p.m., about 150 being present. The two comedies, "La Familia Heredajo" and "Protektado," were given by local Esperantistinoj, and the various parts were ably sustained, the audience thoroughly appreciating the various points made. Other items were a dialogue, "La Bano de la Pastro"—four songs in Esperanto, two each by the Misses Evenden and Goodwin, and the Esperanto songs, "La Vera Frataro," "La Alvoko," and "La Espero," sung by the local Esperantists, the audience joining heartily in the chorus of "La Alvoko." After the above items, Colonel Robinson, of Eastbourne, spoke on the aims and uses of Esperanto, and more particularly as applied to the Red Cross Movement. Speeches were also made by Mr. J. J. Boutwood and Mr. A. J. Adams, of Hastings, and the former complimented those who had taken part, especially as some had only commenced studying Esperanto a few months ago. Mr. Adams referred to the use of Esperanto to the blind,

showing how books in Esperanto opened up a new field of literature to them. We are greatly indebted to Mr. F. Smith, who initiated and carried out the whole evening entertainment, which was such a great success, and we are hoping that Esperanto will in consequence be better known in Bexhill. The two local papers gave full reports.

Doncaster.—La duajara kunveno okazis la 24an de Marto, kaj la sekretario prezentis la raporton. Oni elektis S-ro W. R. Jennings sekretario anstataŭ S-ro Rodgers. Oni voĉdonis dankojn al S-ro Rodgers por lia entuziasma laboro. Oni arangis ekskursojn, piede kaj bicikle, por la venonta sezono.

Grandan Vendredon tri anoj iris al Bawtry por propagandi la aferon inter la Germanaj kaj Italaj laboristoj. Oni disdonis taŭgajn broshuretojn.

Leagrave, nr. Luton.—The group here now numbers 14 members, and is making very good progress in its study of the language. The meeting place is the Women's Adult School-Room in Beachwood-road, and the secretary is Mr. H. Alison Blundel, *The Grange, Leagrave, nr. Luton*, who will be pleased to send all particulars and welcome new members.

SCOTLAND.

Dundee.—La 30an de Marto okazis tre interesa lekcio de S-ro J. M. Warden, kiu vetus el Edinburgo speciale por fari ĝin. La temo estis "Parizo : La Urbo de la Deka Internacia Kongreso de Esperanto," ilustrita per lumbildo. S-ro J. Mitchell prezidis. S-ro Warden per multaj belaj lumbildoj kaj alloga priskribo pri ĉiu bildo ebligis la ĉeestantaron havi tre bonan ideon pri Parizo, ĝiaj riĉaj ornamitaj konstruaĵoj, multe da kiuj havis historiajn rilatojn, la palaco de Versailles, la ampleksaj ĝardenoj kaj fontanoj de tiu fama loko kaj multaj aliaj belaj objektoj en la urbo, al kiu veturos en la unua semajno de Augusto Esperantistoj de diversaj nacioj. Tre ŝatata estis la lekcio.

Edinburgh.—The events which we have to chronicle this month concerning the position of Esperanto in Edinburgh are a very gratifying evidence of the strength of our movement in the Scottish Capital. The Edinburgh Esperanto Society has increased its membership by 22, and at the close of a successful winter session appointed the following office-bearers for next year: President, Mr. W. M. Page, F.B.E.A.; vice-presidents, Miss Jane Baird and Dr. A. E. Scougal; secretary, Mr. Alexander McCallum, 16, *Corniston-gardens, Edinburgh*; treasurer, Mr. Alec. T. Whitehead; consul, Mr. D. R. Tullo, S.S.C.; ordinary councillors, Misses L. Dumbreck Mackenzie, Helen Tait, Elizabeth Reid, M. B. Ingram, and M. F. Williamson, and Messrs. James Robbie, Lewis Caw, H. F. Frazer, and Robert Black.

On March 18, Dr. A. E. Scougal, ex-chief inspector of schools, addressed the Society on "Esperanto kiel Edukilo," and from his long experience as an educationist his opinions as to the value of Esperanto in the school are entitled to great weight. It is hoped that he may see his way to publish his address.

March 25 was given up to the B.E.A. examinations, when 16 sat for the Diploma Examination and 14 for the Preliminary. On April 1 Mr. J. M. Warden, L.K., before a large audience, gave a lantern lecture on "Paris," in the hall of Gilmore Place School. The School Board sent invitations to the pupils of the language classes in the schools to be present, and Mr. William Ramsay, a leading member of the Board, at the close spoke in appreciative terms of the lecture, and of Esperanto. S-ro Maryt, of Amsterdam, addressed the meeting in Esperanto on his experiences of the value of the language to a traveller. His remarks were interpreted for the benefit of non-Esperantists, and made a great impression. On the following evening an

interesting meeting, of which long reports were given in the newspapers, took place in the Grupejo, when the class for policemen which had been conducted by Miss A. M. Munro held a Social Meeting. The Preliminary Certificate of the B.E.A. was handed to 14 members of the class by Bailie Rose, who complimented the men on their success, and in their name presented to Miss Munro a gold locket and chain with suitable inscription. Mrs. Gulland, a member of the School Board, pinned the stars on the men's coats, which the Chief Constable has permitted them to wear. A concert followed, which included a recital on the bagpipes by one of the members of the class, dressed in full Highland costume. On April 8, in the hall of the Philosophical Institution, an original Esperanto play by Mr. Andrew Wilson was presented before a crowded audience. The play, which was entitled "Antaŭ la Kongreso," unveiled in three acts the sorrows of the secretary of an International Esperanto Congress, whose actors had run away, and whose printed matter had all perished in a fire at the printers. The necessary love element was introduced, and the author sustained in a remarkably clever way the rôle of S-ino Appenrodt, a German widow in search of a husband. Mr. James Ford was the Secretary of the Congress, Miss Wilson his typist, Mr. E. J. Davids a retired Colonel in search of a wife, Miss Williamson a pretty actress, and Mr. James Robbie a sculptor in love with her.

WALES.

Sud-Kimruja Ligo.—La ĉiutrimonata kunveno de tiu ĉi kreskanta Ligo okazis en Merthyr Tydfil ĉe la Y.M.C.A.-ejo, Sabaton, la 4an de Aprilo. Antaŭ la kunveno, iuj anoj de la Ligo ekzameniĝis por la kolega grado de la B.E.A. La labora kunsido de la Ligo okazis posttagmeze, kiam la lig-prezidanto (Pastro W. H. Harris, B.A., B.Litt.) prezidis. Post tio, S-ro W. E. Davies (Sekretario de la Ligo) donis modelan lecionon en Esperanto, kiu multe interesis la ne-Esperantistojn ceestantojn. Estis granda plezuro havi en nia mezo S-ro H. Bolingbroke Mudie, la konata prezidanto de B.E.A., kiu faris multon por la viveco kaj sukceso de la kunveno. Vespere propaganda kunveno okazis, kiam S-ro Mudie, ĉar li devas foriri por trafi vagonaron, faris mallongan paroladon interesan. Dum la vespero, Pastroj D. B. Jones kaj R. Morris, kaj S-roj H. Jones, W. J. Emms, Lewis Evans kaj la prezidanto faris paroladojn aŭ pri aŭ per Esperanto, kaj S-roj A. H. Jones kaj Harris kantis. Krom la suprenomitaj, ĉeestis ankaŭ, inter aliaj, Pastro Bodvan Anwyl (Pontypridd), D-ro D. Rhys Jones (Cardiff), multaj esperantistinoj, kaj tri hispanaj samideanoj de Dowlais. Oni devas danki al la agema sindonema samideano, S-ro Lewis Evans, por lia konstanta laboro por la sukceso de la kunveno. La proksima Ligkunveno okazos en Pontypridd en Julio, kaj ĉiu, kiu deziras havi sciigojn pri ĝi devas sin turni al Pastro Anwyl, *Bryn Elen, Tyvica-road, Pontypridd*.

THE FEDERATIONS.

Lancashire kaj Cheshire.—*Dua Esperantista Konkursfesto.*—La intereso vekita de la dua konkursfesto organizita de ĉi tiu Federacio estis kuraĝiga, ĉar ekster la du graflandoj partoprenis en la konkursoj gesamideanoj el Birmingham, Coventry, Edinburgh, Halstead, Kettering, London, Radlett kaj Tile Hill Lane. La elektado de la Paska libertempo por okazigi la feston, pro neantaŭviditaj kaŭzoj, ne ĉeestigis tion da personoj kiom oni atendis, kvankam dum la tago kredeble pli ol 200 eniris la halon.

En Liverpool denove ĝi havis lokon, kaj sur la estrado kun lia moŝto la urbestro (Herbert R. Rathbone, Esq., J.P., C.C.) sin trovis Kolonelo Pollen, Gesinjoroj Blaise, Sinjoro Cedric White (Prezidanto de la Mezlanda

Federacio), Sinjoro Philip Sellick (Prezidanto de la Liverpoola grupo), kaj la federacia joficistoj kaj iliaj edzinoj.

Lia mosto tre simpatie parolis pri nia movado, kaj al li proponante dankesprimon, Sinjoro Rhodes Marriott (Prezidanto) kaj Kolonelo Pollen trafis la okazon prezentis skizeton de nia laboro kaj celo.

La literaturaj konkursoj estis juĝitaj de Gesinjoroj Blaise, Fraŭlino Florence Barker, B.A., kaj Sinjoro W. W. Mann, kaj kvankam la laboro tiucele farita ne estis tiel kontentiga kiel tiu de la pasinta jaro, oni tamen rajtas konkludi el la raportoj, ke troviĝas inter la verkistoj bona talento, kiu antaŭpromesas pli meritoplenan verkon en la estonteco. La aljuĝoj faritaj estas jene:—Poemo: S-ro F. W. Hipsley (Birmingham) kaj F.-ino Clarice O. Taylor (Coventry); teatraĵo: S-ro J. Applebaum (Liverpool); originala verko: F.-ino Iddon (Southport), S.-ino W. E. Hailstone (Tile Hill Lane) kaj S-ro J. Almond (London); traktato pri "Internacieco": S-ro G. R. Griffiths (Liverpool); traduko de "Of Ambition," de Bacon: S-ro F. W. Hipsley (Birmingham); traktato pri "Kiel plej bone instrui esperanton al infanetoj": S.-ino Langley (Buxton). Desegno (ekslibriso): S-ro J. Illingworth (Southport), juĝita de S-ro Frank Rutter, B.A. (Leeds), kaj S-ro Geo. Ledger, I.P.S. (London) aljugis la premion por la stenografia konkursa al S-ro Albert E. Smith (Kettering).

La aljuĝoj faritaj de S-ro Butler pri la muzikeroj estas:—Soprana kanto, "La Radšpinil": F.-ino Neville (Chorley); kontralta kanto "La Promeso de l' Vivo": S.-ino Probert (Pendleton); tenora kanto: S-ro McCabe (St. Helens). La deklama kaj parolad-konkursoj vekis grandan intereson kaj en la unua, S-ro Philip Sellick kaj lia kunjuĝintoj S.-ino Blaise kaj Kolonelo Pollen dividis la premion egale inter S.-ino Applebaum (Liverpool), S-ro Hipsley (Birmingham), kaj F.-ino Iddon (Southport). S-ro W. B. Currie (Burnley), priparolinte la temon: "Kiel la nacieco kaj vera patriotismo estas helpataj de la internacieco," gajnis la premion.

La ĉefa ero estis la kronado de la laŭreato de la festo. La aljuĝo estis farita de S-ro Edmond Privat, kiu sendis tre kuraĝigan kaj plenkonsilan leteron pri la verkoj al li submetitaj. Post tre zorga atento kaj pripensado li aljugis la premion al F.-ino Iddon (Southport), "kies flua kaj plaĉa stilo nepre preterpasas la valoron de l' temo kaj de l' rakonto mem." Si estis kronata de la unua federacia bardo (S-ro Pollard, Buxton), (kiu verse esprimis siajn gratulon kaj bondeziron), kaj ricevis de S.-ino Rhodes Marriott la oran medalon donacitan de la Prezidanto. Post la ceremonieto la laŭreatino faris tre beletan paroladon.

Inter la multnombraj vizitantoj, kiuj ĉeestis la feston, estis gesamideanoj el Accrington, Birmingham, Bradford, Burnley, Bury, Buxton, Chester, Chorley, Glasgow, Huddersfield, Kettering, Leigh, London, Manchester, Middleton, Northampton, Oswestry, Preston, Rochdale, St. Helens, Southport, Wallasey, Widnes kaj Wigan.

Post la konkursa kunveno oni kune temangis en aparta ĉambro. Vespere la Drama Societo Esperantista de Liverpool ankoraŭ unofoje "ĉarmis la aŭdantaron per bona prezentado de originala duakta tragedio, "La Suldo," verkita de S-ro Ernest Bromilow kaj G. R. Griffiths, membroj de la societo. La roloj estis bonege subtenataj de F.-ino Florence Broughton kaj Mary G. Holding, kaj S-ro Bromilow, Griffiths kaj Maurice J. Palmer. Je la fino de la prezentado oni ricevis kuraĝigan kaj bruegan ovacion, al kiu S-ro Bromilow taŭge respondis.

Dum la kunveno oni disvendis specialan eldonon de "Nia Propra," kiu enhavas ĉiujn raportojn de la

juĝintoj, prologenon pri la Liverpola grupo, planon de la prezentita dramo, k.t.p. Oni sin turnu al S-ro J. G. Baxter, 29, Wellfield-road, Walton, por ekzempleroj (3½ pencoj afrankite).

La grupo de Liverpool dum la semajnsfino organizis amikecan kunvenon por festi sian dekan datrevenon, kaj interalie S-ro Blaise, kun sia kutima sindonemeco kaj afableco, faris bonegan lumbildan paroladon pri Parizo por helpi al la sukceso de la deka. Dimanĉon okazis la unua Esperantista Diservo en Liverpool, kiam nia bonekonata pioniro kaj iama prezidantino, S.-ino Blaise, faris tre belan kaj laŭdatan predikon. F.-ino M. G. Holding kaj H. H. Jones legis la lekciojn kaj S-ro Butler prizorgis la muzikon.

La ĉeesto de tiom da eminentuloj kaj eksterfederaci-anoj faris al ni grandan plezuron kaj ni elkoris dankas al ili. Estas certe, ke tio pruvas, ke la ideo de konkurs-festo estas al ili alloga kaj interesa. Ĝi nedubeble *povus* esti tre bona kaj efika propaganda rimedo, kaj sam-tempe ĝi *povus* krei en la esperantistaro pli intiman kaj daŭran intereson en nia literaturo. Ni serioze rekomen-das la ideon al la tuta brita samideanaro laŭ tiu vidpunkto, ĉar ĝi jam estas aprobita kaj efektive parte alprenita de kelkaj disigitaj esperantistaj rondoj, sed kiom pli valora ĝi estus, se ĝi estus alcentrigata en iu granda nacia festo, en kiu partoprenus konkursintoj el ĉiuj partoj de la brita insularo?

Londona kaj Regiona.—Ĝia naŭa konferenco organi-zita de la loka grupo okazis sabaton, la 28an de Marto, en Toynbee Hall, Orienta Londono, sub la honora prezido de S-ro J. St. G. Heath, estro de la Toynbee Organizaĵo.

S-ro G. J. Cox, prezidanto, prezidis la kunvenon, sukcesplenan ĉiurilate. La afera parto estas ĉeestita de pli multaj samideanoj ol iu antaŭa konferenco. Oni povas sekve diri, ke la diskutoj okazintaj dum la Wood Green'a kunveno "pri la neceseco de Federacio Lon-dona" bone efikis.

Nova regularo estas alprenita sen diskuto krom la lasta ero, kiun tamen fine ĉiuj ĉeestantoj akceptis, kaj kiu legiĝas jene:—*Ke Esperanto sole estas la oficiala lingvo uzata ĉe la Federaciaj kunvenoj, krom pro speciale permeso.* (Tiu escepto rilatas nur al gravaj neesperantistaj ĉeestantoj, ĉu ili mem alparolas la konferencon, ĉu ili estos alparolataj).

Tuj poste, laŭ propono farita de S-ro Almond en komitata kunveno kaj unuanime akceptata de la komitatanoj, S.-ino Blaise estas elektita Vic-Prezidanto de la Federacio.

Sinsekve parolis:—S-ro J. Gourlay, kiu diris kelkajn vortojn de bonveno al la ĉeestantoj kaj rezumis la historion de nia movado en Orienta Londono. Li vidis en sonĝo, ke baldaŭ la verda standardo flirtos ĉie en la Oriento.—S-ro C. A. Fairman, la nelacigebla kaj tre modesta sekretario, klarigis "kial ni perdas la lernantojn." Lia ĉefa argumento eastas, ke tro ofte oni prezentas Esperanton laŭ aspekto tro facila, kaj la lernantoj malkuraĝigas, sekve forlasas la studon de nia lingvo.—S.-ino Blaise atentigis la ĉeestantaron pri "Kelkaj Eraroj" komunaj al multaj esperantistoj, eraroj gramatikaj, pri akcento, uzo de vortoj similaj en ambaŭ lingvoj, malbona uzo de aliaj pro nepensemulo malbona elparolo, k.t.p.—S-ro Blaise aldonis kelkajn argumentojn tre fortajn al tiuj de S-ro Fairman pri la kialoj de la perdo de lernantoj kaj ankaŭ pri la perdo de membroj en kluboj. La kunvena prezidanto be-daŭrinde ne lasis al li tempon por almenaŭ laŭdi la plej bone konatan kaj fervoran instruiston en Londono, al kiu tiuj vortoj tute ne adresiĝas.—S-ro Zocher, la laborista paroladisto, tre humore montris, kial la Esperantista movado tro malrapide progresas. "Esperantistoj estas idealistoj.... Komercistoj venos al ni nur

altiritaj de deziro al mongajno....Registaroj neniam helpas al la progreso; ili akceptas progreson, kiam ĝi estas *fait accompli*....Pastro Chambers el Orienta Londono parolas pri la lingvo kiel senpartia ilo utiligota en ĉiuj agadkampoj mondaj.—S-ro W. H. Browne alvokis la atenton de propagandistoj al la bona laboro farita lastan jaron en Hyde Park, kaj la plia propagando farota dum la proksima somero. (Espereble multaj rememoros pri tiu alvoko, kiam la publika sezono rekomenciĝos en la parko).* S-ro Cox fremis la aferan parton de la programo per kelkaj vortoj pri la progreso de nia movado en Londono, progreso ne sufice granda por feliĉigi la verajn Esperantistojn.

La plezuramantoj estis tiel kontentigitaj kiel la satantoj de la labora kunveno. Ĉiun programeron ĝuis ĉiuj partoprenantoj, kiuj donis al deklamistoj, kantistoj kaj ludistoj korajn aplaŭdojn. Nia himno "La Espero," kantata sub la direkto de S-ro Ch. Evans kaj akompanata de orkestro, sonis pli bele ol iam antaŭe en niaj kunvenoj. S-ro M. C. Butler ĉarmis sian aŭdantaron per soloj de harpo, dum S-ro Woodfield per violono, F.-ino Frost per piano kaj la orkestro per bonega muziko interesis la samideanaron. Inter la belaj kantoj esperantaj de S.-ino Winkler, anglaj de S.-ino Evans-Warwick kaj S.-ro Webb, kaj la Esperantaj deklamoj de S.-ino Evans (Battersea) kaj de S.-ro Fleming-Fulcher ni ankaŭ ne forgesu la gajigajn dirajojn kaj kantojn de nia ĉiama amuzisto, Harrison Hill.

Dum la koncerto ni havis la plezuron aŭdi la historion de la Halo, en kiu ni kunvenis, de la estro mem, S.-ro Heath. Li esprimis sian plezuron bonvenigi la Esperantistojn en tiu ideala kaj socia institucio, en kiu Esperanto estas instruata de nia samideano Gourlay. S.-ro Mudie dankis per kelkaj afablaj vortoj kaj montris al S.-ro Heath, kiamaniere la anoj de la institucio povus profiti per Esperanto. Ankaŭ parolis S.-ro Epstein pri la U.E.A. kaj la servoj faritaj de li dum la lastaj semajnoj. Multaj anoncoj pri diversaj kunvenoj, paroladoj, kursoj, k.t.p., estas faritaj, kiuj montras, ke sendube nia afero progresas en Londono.

Post ĝojplena dancado, kiu daŭris ĝis la 11a horo, oni disiĝis kun espero revidi unu la alian ĉe la proksima konferenco, okazonta verŝajne en la Blanka Urbo dum Esperanto Tago.

INDIA.

Simla, India.—From *The Red Lamp*, March, 1914:—
"One of our local weeklies has been devoting some space lately to this Help Language, and a remark to the effect that General Baden-Powell, in recommending it to Boy Scouts, said it was taught in a little book costing one penny, led us to obtain a copy. We are charmed both with the book and the language and if, as our contemporary says, there are many Esperantists in Simla, we may, perhaps, have a word to say on the subject every month. Meanwhile, we will obtain copies of *Esperanto for All*, for any of our readers, at the rate of 1a. each. We will stand the postage."

SOME RECENT LECTURES.

Dundee.—On March 30, under the auspices of the Burns Society, Mr. J. M. Warden on "Paris: the City of the Tenth International Esperanto Congress," illustrated with fine lantern slides.

Hebden Bridge.—On April 4, before the members of the Scientific and Literary Society, Mr. J. T. Holmes, on "Internationalism Illustrated." Great interest was aroused by the slides and the collection of Esperanto postcards, gazettes, guide-book, catalogues, drawings and paintings received from Japan through Esperanto, which were exhibited by the lecturer.

* Vidu anoncon en ĉi tiu numero, p. 82.

Woolwich.—On April 1, before the members of the Royal Arsenal Co-operative Society Men's Guild, under the chairmanship of Mr. A. Darkwood, Mr. W. H. Dennis on "How an International Language would benefit the Co-operative Movement." There was a very good attendance.

Merthyr Tydfil.—Recently, at Abermordais School, under the auspices of the Merthyr Teachers' Association, Mr. H. Bolingbroke Mudie, on "Esperanto." Mr. R. G. Price, headmaster of Dowlais Boys' School, occupied the chair, and there was a good attendance of local teachers, who followed the excellent address of the lecturer with much appreciation. At the close numerous questions were asked by those present, and ably answered by Mr. Mudie in his own inimitable manner.

New Groups.—Groups in the four following places have affiliated to the B.E.A. during the past six weeks:—COLNE (Lancs.), BOGNOR, ROYSTON, and WELLINGTON, New Zealand. To each and all a hearty welcome and best wishes for their continuance and progress.

The New Offices of the B.E.A.—It is hoped by the time this number of B.E. is in the hands of readers that the Reading Room will be ready for the use of the members.

The new telephone number is: Museum 617.

Nekrologoj.

HON. FRANCIS ALBERT ROLLO RUSSELL, M.A.

Kun bedaŭro ni sciigas pri la morto de la Hon. Rollo Russell, kiu okazis post nur septaga malsano en la 66a jaro de lia aĝo.

Li estis filo de la unua Earl Russell, verkis multajn artikolojn pri la meteorologio kaj estis unu el la komitatoj de Bedales School, Petersfield. Tie li renkontis S.-ron Privat—kiu instruis la lingvojn Francan kaj Esperantan en la lernejo—kaj fariĝis fervora partiano de Esperanto kaj aliĝis al B.E.A. Propaganda kunveno, laŭ lia afabla invito, en la Londona domo antaŭ precize unu jaro.

Al la vidvino kaj familio de nia mortinta samideano ni transdonas plej sinceran simpatian.—H.B.M.

GEORGE COLES LAW.

Kun tre granda bedaŭro ni anoncas, ke Sinjoro Geo. C. Law mortis en Plymouth la 15an de Aprilo.

Li estis unu el la pioniroj de la Esperantista movado en Anglujo. Li estis la unua membro kaj unua prezidinto de la Battersea'a Esperantista Klubo. Ĉiam li laboris por nia sankta afero. Li kunlaboris en la efektivigo de la Poliglota Vade-mecum de Int. Farmacio. Li estis amata kaj respektata de ĉiuj siaj amikoj kaj konatuloj. Li ripozu en paco. Al lia edzino kaj filo plej sinceran simpatian.—SOLOM.

Edzigoj.

La 2an de Aprilo, F.-ino Mary C. Hutchinson al S.-ro Alan H. Percival. *Plej korajn gratulojn kaj bondezirojn de Londonaj amikoj.*

En Southport, la 14an de Aprilo, D.-ro Joseph Jones, prezidanto de la Grupo en Leigh, al F.-ino Annie Berry.



"The man who was guilty of saying that English would carry you all over Europe was but a patriotic humorist."—BART KENNEDY, in *Everyman*.

The Seventh British Esperanto Congress.

Sheffield, May 30—June 2, 1914.

Are you coming to the Sheffield Congress? *

Everything has been arranged for a record Congress, and all that remains now is for each Esperantist to do his or her part, and success is assured.

If preliminary enrolments are a good sign, the number of Congressists will be a large one indeed, and already we are assured that the movement will be well represented. Towns and cities in north and south are represented, and the enquiries from abroad are a sign that interest in our National Congress has been aroused. *Aligiloj* have been sent to all the groups, and may be obtained from the secretaries. We shall be pleased to send those who have not yet received one, a copy on receipt of a postcard.

The following is an outline of the programme as at present arranged:—

Saturday, May 30.

10 a.m.—*Akceptejo* opens.

11 a.m.—Visit to the Ruskin Museum.

2.45 p.m.—Visit to the Mappin Art Gallery.

3.45 p.m.—Group photograph of the Congressists.

7 p.m.—Welcome by the Lord Mayor.

8 p.m.—Concert.

Sunday, May 31.

9.15 a.m.—Esperanto Service (arranged by the *Eklezia Esperanta Ligo*).

12.45 p.m.—*Familia Tagmango*.

Short rambles into the suburbs during the afternoon.

8.30 p.m.—*Akceptejo* opens. Informal meeting for *babilado*, etc.

Monday, June 1.

9 a.m.—Annual meeting of the British Esperanto Association.

11.15 a.m.—Meeting of the *Socialista Ligo*.

11.30 a.m.—Meeting of the U.E.A.

12.15 a.m.—Meeting of the Societo "Paco per Esperanto."

2 p.m.—Excursion to Eyam.

9 p.m.—Informal meeting in the *Akceptejo* for *babilado*.

Tuesday, June 2.

9.30 a.m.—*Akceptejo* opens.

Rambles to various places of interest in the neighbourhood during the day. (Details on the notice board in the *Akceptejo*).

Members of the Reception Committee will meet all main-line trains at both stations, and direct Congressists to their hotels. We should be pleased if members would inform us of the time of their arrival, so that all arrangements may be made for them. Members of the Committee will wear the Congress badge and rosette.

Special arrangements have been made for those who prefer a vegetarian diet, and, providing that a sufficient number apply for tickets, a vegetarian dinner will be served on Whit Sunday at the Vegetarian Café in the city, at a cost of 1s. 9d. per head. A good number have applied for the tickets for the "familia tagmango," and this promises to be a most enjoyable event, providing, as it does, a splendid opportunity for social intercourse.

The *Eklezia Esperanta Ligo* report that arrangements are well in hand for the Esperanto Service on Whit Sunday, and full details will be given in the Congress-Book.

We have pleasure in announcing that the Lord Mayor, Colonel E. G. Branson, will welcome the Esperantists to the city, prior to the concert, on Whit Saturday evening.

* For Messrs. Thos. Cook & Son's (*U.E.A. Entrepreno*) travel arrangements, see advertisement, p. vii.

The Congress-Book is now in the hands of the printers, and will be posted to all those whose names are on the Congress-List. The book will form a pleasing souvenir of the Congress and the Congress city.

We would like to remind intending Congressists of the arrangements for accommodation at the hotels. The Lodging Committee have reserved rooms at all the principal hotels in the city. On receipt of the *aligilo* this Committee will forward the hotel coupon to the Congressist, giving the name of the hotel at which a room has been reserved. Members will be booked at the hotels in groups, so that all may have facilities for social intercourse during the week-end.

We should be pleased if the secretaries of divisional societies who wish to arrange meetings of their societies will let us know as soon as possible, in order that full arrangements may be made. The Council of the Sheffield Y.M.C.A. have placed the whole of their magnificent building at our disposal for Whit Monday, so that ample room will be available.

Any information which members may require will be given on application to the secretaries. A large staff are busy at work dealing with the various applications from intending Congressists, and prompt attention is assured to all enquiries.

Everything now depends on the support of the members of our movement. We are hoping for a good result from a propaganda point of view, and there is every sign of increasing interest in our work in the city. Sheffield, as one of the principal centres of industry in the country, has much to gain by Esperanto, and we feel confident that, if the members of the movement will support us in our effort, much will be done in gaining the leaders of industry to our movement. At the same time we offer to you the opportunity of a most enjoyable holiday. The district is an ideal one for country rambles and excursions. The dales of Derbyshire offer a wide field for each and all, and members of the Reception Committee will lead parties to the many places of beauty and interest during the week-end.

Gis la revido,

N. W. ROBERTS, W. HAGON, Hon. Secretaries,
Y.M.C.A., 49, Fargate, Sheffield.

Cheap Excursions will be run to Sheffield by the Great Central Railway Company, for 3, 4 or 8 days, on Friday, May 29th, by train leaving Marylebone at 10 p.m., at a fare of 15s. for 3 or 4 days, and 18s. for 8 days.

There will also be Excursion Bookings for a similar period and fare on Saturday, May 30th, presumably by trains leaving Marylebone at 2.10 p.m. and 3.15 p.m.

Accommodation will be reserved on these trains, and all intending *Gekongresontoj* should apply for tickets at the earliest possible date, so that the arrangements may be completed.

Tickets may be ordered from Mr. A. GRACEY, "Hedingham," Pinner-road, Harrow-on-the-Hill.



U.E.A. Konferenco en Sheffield.

Oni nun faras aranĝojn por konferenco de U.E.A. Delegitoj kaj Membroj dum la B.E.A. Kongreso en Sheffield, kiam oni diskutos la estintecon kaj estontecon de la U.E.A. en Granda Britujo. La daton, horon, kaj lokon oni poste anoncos.

Ciu Delegito ĉeestonta devas nepre prepari sian raporton por legi ĉe la kunveno, kaj tiuj, kiuj ne povos ĉesti, estas petataj sendi siajn raportojn antaŭ la 25a Aprilo, al S-ro Harry A. Epstein, Ĉef-Delegito por Londono, 17, Hart-street, London, W.C.—EPIO.

"La Deka" en Parizo.*De la 2a ĝis la 10a de Aŭgusto, 1914.**Sekretaria Adreso : 3, Place Jussieu, Paris.**Telegrafo Adreso : Esperanto-Paris.*

Nenian specialajn sciigojn pri nia Internacia Festo mi havas ĉi tiun monaton, tial ke ĉiujn havigeblajn detalojn mi donis en nia lasta numero kaj ricevis nencion plu el Parizo.

La provizora programo anoncita kiel aperonta dum Majo estos presata en Junio.

Mi nun nur altiros la atenton de ĉiuj samideanoj pri la fakto, ke post la 30a de Majo la Kongreskarto kostos £1, anstataŭ 12s., kaj 16s., anstataŭ 8s. po familiaro de Kongresano. Tiu altigo de la prezo estas farata por eviti la malfruan enskribon de multaj kongresontoj, ĉar efektive malfruiĝo okazigas al la Kongresa Komitato gravajn malhelpaĵojn, rilate al la aranĝoj pro la kunvenoj, teatraĵoj, promenadoj, k.t.p.

Esperantistoj ne forgesu, ke la Pariza Kongreso estos unika pro la nombro de la ĉeestantoj, kaj sekve specialaj antaŭzorgoj devas esti priatentataj. Ĝis nun ĉirkaŭ 2,000 aliĝis, t.e., nombro pli granda ol tiu de la enskribintoj ĉe kiu ajn antaŭa Kongreso Esperantista.

Se oni priatentas la fakton, ke "La Deka" okazos nur post tri monatoj, oni povas antaŭvidi ĉeestantaron multe pli grandan; kaj estas facile imagi al si, kiel malfacila estos la tasko de la organizantoj provizi ĉion necesan por la miloj da malfruemuloj.

La "monpuno," kiel kelkaj ĝin nomas, estas komprenebla, se ne tute subteninda, (plie oni ne forgesu, ke la neĉeestantoj rericevos sian monon, se ili skribos antaŭ la komenco de la Kongreso). Tamen la komitato scias pli bone, kion ĝi devas fari kaj kiel ĝi devas agi, por ke nia kongreso estu sukcesplena, kaj por eviti al si poste plendojn de ĉeestintoj.


Ĉiu scias, ke neble estas kontentigi ĉiujn (kiel diras la francoj: *On ne peut pas contenter tout le monde et son père*). Oni ne povas kontentigi ĉiujn kaj sian patron), eĉ Esperantistoj ne estas perfektaj; kiel estis provita de la plendoj ricevitaj de la organizintoj de la antaŭaj kongresoj, sekve rilate al aranĝoj farotaj pri loĝejoj kaj mangajoj kiel ankaŭ pri vojago al — kaj de Parizo la Kongresa Komitato petas la britajn samideanojn, ke ili sin turnu al la oficialaj Agentoj de la Kongreso, Messrs. Thos. Cook & Son, *Ludgate Circus, E.C.* Estas konsilinde, ke samideanoj, kiuj deziras restadi en hotelo kun specialaj amikoj skribu pri sia deziro al la Agentoj; sed preferinde estas, ke antaŭ ili aranĝu kun siaj ĉeestontaj amikoj, ke ankaŭ ili kiel eble plej frue aliĝu. Se, post aliĝo kaj sendo de partpago por la vojaĝkostoj, iu Esper-

antisto konstatos je la lasta momento, ke li aŭ ŝi ne povos ĉeesti la Kongreson, la mono povos esti repostulata de la firmo Cook, kiu ĝin tuj resendos.

Mi finos ripetante, ke por helpi al la diskonatigo de "La Deka," parolantoj povos pruntepreni de mi klišaron de Parizo kun mašinskribita prelego.

La solaj kondiĉoj pri luado estas, ke interesatoj mendu la kolekton sufice frue, pagu la send- kaj resendkostojn, kiel ankaŭ la koston por anstaŭigo de rompitaj aŭ fuditaj klišoj.

P. BLAISE, *Hon. Helpanto de "La Deka,"
125, Hambalt Road, Clapham, S.W.*

**Messrs. Thos. Cook & Son's Arrangements.***

As Official Passenger Agents to the Committee of the 10th International Esperanto Congress, *Messrs. Thos. Cook & Son* are announcing a Special Private Conducted Party to Paris, travelling as follows:—

Saturday, August 1.—Leave LONDON (Charing Cross Station) at 4.30 p.m., *via* the short sea route—Dover and Calais. Arrive PARIS (Nord Station) at 11 p.m.

Sunday, August 9.—Returning from PARIS (Nord Station) at 8.25 a.m., *via* Boulogne and Folkestone. Arrive LONDON (Charing Cross Station) at 3.25 p.m.

At an inclusive fare of £8 15s., with superior hotel accommodation. Short sea route. No night travelling. Full particulars on application.

Bookings have already been received. Registration in the near future is essential.

Cheaper parties will also leave *via* NEWHAVEN—DIEPPE and FOLKESTONE—BOULOGNE at inclusive charges of £3 17s. 6d. and £4 4s. respectively. (For particulars see March BRITISH ESPERANTIST (p. 56), or write to Thos. Cook & Sons).

Mr. P. Blaise (Delegate of the Universal Esperanto Association) will accompany one of these parties.

Accommodation.—*Messrs. T. Cook & Son* guarantee that the establishments they will utilise are equipped with modern sanitation.

Extensions.—Arrangements can be made for members to proceed to Paris in advance of August 1, or return after August 9. Extensions to the Castles of Touraine or elsewhere can be made. Special quotations will be given upon application.

**Dean & Dawson's Arrangements, Saturday Afternoon, August 1.**

Tour No. A.—From London (Victoria), at 2.20† p.m., by special service *via* Newhaven and Dieppe, arriving Paris about 11.25 p.m. On arrival passengers will be conveyed to hotel and served with light supper. The hotel service each day during the stay will be continental breakfast; evening dinner; bedroom; light and service. The last meal will be dinner on Saturday, August 8. Visitors return, independently within the validity of the ticket (15 days), from St. Lazare Station at 9.20 p.m. (1st, 2nd, and 3rd class), or 10 a.m. (1st and 2nd class only).

* See also advertisement on front cover.

† Subject to alteration.

Inclusive charge from London, with 2nd class travel and accommodation at Hotel Florence as mentioned, £3 16s.

Those intending to travel saloon on steamer are specially recommended to take 1st class throughout, otherwise they will pay 10s. for 1st class on boat only. (9s. extra).

Tour No. B.—For those who are unable to travel by above another party will leave London (Victoria, L.B. & S.C.R.) at 8.45 p.m., Saturday, August 1, and their accommodation will commence with breakfast on Sunday morning.

Inclusive charge, with 2nd class travel, £3 11s. 6d. 3rd class travel, 6s. 8d. less.

Tour No. C.—From London (Victoria), at 3.50* p.m., by special service *via* Dover—Calais, arriving Paris (Nord) about 11 p.m. Return independently from Nord Station at 8.25 a.m. or 2.30 p.m. services, *via* Boulogne, or by the 9.20 p.m. or 12.30 midnight (not Sundays) services, *via* Calais, according to class.

Inclusive charge from London, £4 3s. 3d.

Same class and accommodation as A.

Tour No. D.—For those who are unable to travel by above, another party will leave London (Charing Cross) at 9 p.m., Saturday, August 1, and their accommodation will commence with breakfast on Sunday morning.

Inclusive charge from London, with 2nd class travel, £3 18s. 9d. 3rd class, 9s. 11d. less. 1st class, 19s. 5d. more.

Arrangements have been made for those who may prefer to have their luncheon and evening dinner at convenient restaurants, etc., to be able to reserve a bedroom, with continental breakfast, at a moderate charge. The hotel is fitted on modern lines, each room has hot and cold water, a bath may be obtained in the hotel without extra charge, and there are no "tips."

Only a limited number of these visitors will be booked.

In connection with most of Dean & Dawson's Continental Tours it is worth noting that reduced fares are now in operation for travel from stations on the Great Central, Great Eastern, Lancashire and Yorkshire, North Eastern, Great Western, certain stations on the L. & S.W., also L.B. & S.C., and other English and Scotch railways, in connection with circular tour tickets for continental travel, as announced in this programme. The reduced fare ticket is only available from stations not less than 30 miles from such stations as London, Grimsby, Hull, Newcastle, March, etc., which are treated as the starting point for a continental journey. These tickets are only issued at the time the continental tickets are prepared, and cannot be procured at any other time; therefore, it is important that intending travellers should apply for through tickets from their nearest station, when arranging for their Continental Tour.

Tour No. A. will be accompanied by Mr. A. Gracey, "Hedingham," Pinner-road, Harrow (Delegate of the Universal Esperanto Association), to whom please address all enquiries and applications for tickets, giving reference to the tour by which it is desired to travel.



Paco per Esperanto.

SOCIETO ESPERANTISTA POR LA PACO.

Malmultaj britaj samideanoj ŝajne scias pri la ekzisto de tiu societo starigita de S-roj D-ro ARNOLD (Germanujo), CHAVET (Francujo) kaj F. MOSCHELES dum la Washington'a Kongreso en 1910, kvankam la Esperantistaj pacifistoj kunvenis ĉe la sekvintaj kongresoj.

Laŭ decido prenita de la organizantoj suprenomitaj ĉiuj komunikoj oficialaj de la Societo aperas en *Informa*

* Subject to alteration.

Bulteno de *Oficiala Gazeto*, kaj la Societa Sidejo estas nun 51, rue de Clichy, Paris—(Gi povos esti ŝangata laŭ decido de la Societanoj).

Dum la Deka Kongreso de Esperanto en Paris, 1914, okazos ĝeneralaj fonda kunveno de la Societo, kiu ebligos regulan funkciadon kaj laboradon.—Por ke la britaj samideanoj interesataj en la Paco Movado povu utile ĉeesti la tiaman kunvenon kaj scie pridiskuti la utilon kaj agadrimedojn de la nova Asocio estas necese, ke ili almenaŭ studu la ĉefajn artikolojn de la regularo, kiuj legiĝas laŭsekve:

PROVIZORA REGULARO.

1.—*Celo, rimedojo por agado, kaj sidejo de la Socio.*

Art. 1a.—La Internacia Societo Esperantista por la Paco Paco per Esperanto celas :

1e. Propagandi la ideon solvi la malkonsentojn internaciajn per interkonsento aŭ jugo, kaj laboradi por la reciproka alproksimiĝo de la popoloj, por ke la sistemo de organizita paco anstataŭu la sistemon de paco kun armado;

2e. Plifaciligi la taskon de la aliaj Societoj por la Paco, propagandante inter ili la scion kaj uzadon de Esperanto.

Gi malpermisas al si ĉian alian agadon, kaj nome ĉian disputadon aŭ propagandon rilatan al la interna politiko de la regnoj kaj al la religiaj demandoj.

2.—*La ĉefaj rimedojoj por la agado de la Societo estas :*

Publikigi la esperantan tradukon de la oficialaj dokumentoj kaj precipaj verkoj, kiuj rilatas al la pacifisma propagando, kaj eldoni per Esperanto originalajn verkojn;

Instigi la tradukadon kaj eldonadon per Esperanto de ĉiuj verkoj rilataj al ĝia celo;

Fondi regionajn grupojn por la studado kaj propagando de la pacifismaj ideoj;

Posedi fiksajn aŭ rondirantajn librarojn, tiel ĉe la societa sidejo, kiel en la grupoj;

Havigi la verkojn pri pacifismo aŭ Esperanto;

Organizi publikajn aŭ privatajn paroladojn, k.t.p.

5.—*Ciu societano pagas ĉuijare kotizon po 1 fr. 25, kiu rajtigas lin partopreni en la generalaj kunvenoj, ricevi senpage jaran raporton pri la Societo, ricevi senpage aŭ rabate la aliajn societajn eldonojn, kaj partopreni en ĉiuj aliaj utiloj donataj al la societanoj.*

6.—*Membroj donacintoj* estas la personoj, kiuj pagas ĉiujaran kotizon de 25 frankoj.

Oni povas anstataŭigi sian kotizon per unu sola pago dudekobra, kiu rajtigas por la jenaj titoloj ; pro pago de 25 frankoj, *ĉiama membro*—de 500 frankoj, *ĉiama donacinto*.

7.—La titolon *honora membro* povas doni la Centra Komitato aŭ la Generala Kunveno al personoj, kiuj faris grandan servon al la Societo. De tiuj membroj nenio kotizo estas postulebla.

8.—La Societo petadas kaj akceptas dankeme ĉiujn donacojn, kiuj povas helpi al ĝia agado.

9.—La enpreso de la kotizoj kaj donacoj en la plej proksima numero de la oficiala organo taŭgas kiel kvitanco.

10.—La societa budĝetperiodo daŭras de la unua de Januaro ĝis la tridek-unua de Decembro.

Laŭ aranĝo kun la komitato de la Brita Esperantista Kongreso en Sheffield, kunveno de "Pacificistoj Esperantistoj" kaj subtenantoj de la Pacaj Ideoj okazos Pentekostan Lundon en la Komitatata Ĉambro de la Y.M.C.A. post la kunveno de U.E.A. tio estos ĉirkaŭ 12.30.

Interesatoj povos ricevi plenan provizoran regularon de la Honora Kasisto-sekretario por Granda Britujo, P. BLAISE, 125, Hambalt-road, Clapham, London, S.W.

Komerca kaj Industria Ekspozicio.

ESPERANTISTA KOMERCA KAJ INDUSTRIA ASOCIO.
(*Esperantia Entrereno N-ro 282*).

INFORMOJ.

I.—Okaze de la Deka Universala Kongreso de Esperanto, E.K.I.A. officiale organizas Komercan kaj Industrian Ekspozicion.

II.—E.K.I.A. ekspozicias ĉiajn komercajn kaj industriaĵojn al ĝi senditajn de ĉiaj firmoj, kondiĉe, ke tiuj firmoj havu siajn reklamilojn, prospektojn, prezaron esperante presitajn, aŭ dulingve (nacie kaj esperante); ne bezone estas, ke ĉe la firmoj mem oni parolu Esperanton.

III.—E.K.I.A. zorgos pri ricevo, ekspoziciado, instalado, gardado, returnensendo de ĉiuj specimenoj (maŝinoj, iloj, produktoj) sendotaj, kaj plenumos ĉiujn postulojn de la Ekspozicio.

IV.—Dum la Ekspozicio E.K.I.A. ankaŭ ricevos mendojn, kiujn ĝi transdonos tuj al la firmoj, por ke ili plenumu kiel eble plej rapide la mendojn faritajn kaj tiamaniere ricevu tujan profiton.

V.—E.K.I.A. sin disponigas al la firmoj por la Esperanta tradukado senpaga de ĉiuj reklamiloj.

VI.—La Organiza Komitato zorgos pri la taga kaj nokta gardado.

REGULARO.

I.—La firmoj dezirantaj havi lokon en la Ekspozicio sendos siajn petojn al la prezidanto de E.K.I.A., klarigante la specon de ekspoziciaj, la surfacon bezonan.

II.—Tiuj, kiuj deziras nur montri siajn katalogojn, prezarojn, k.t.p., ricevos senpagan lokon.

III.—La elspezoj farotaj pro sendado, limdepago, returnensendo estas pagotaj de la firmoj, por ke E.K.I.A. ne havu malhelpaĵon pro tio.

IV.—La firmoj konigu konfidencie al E.K.I.A. la valoron kaj la vendprezon de ĉiu sendatajo.

V.—Pro instalaj elspezoj, la firmoj pagos al E.K.I.A. po 5 frankoj (2 spesmiloj) por ĉiu kvarono da kvadrata metro; tiu sumo estos sendata samtempe kun la ajoj ekspoziciotaj.

VI.—Estas malpermesate al la firmoj havi en la ekspoziciejo, ĉu oficiston, ĉu disdonanton de reklamilo; nur la E.K.I.A.-aj oficistoj klopoj pri tio.

VII.—Ne plu estos akceptataj aliĝoj post la 1-a de Julio, 1914.

ALVOKO.

Komercistoj kaj Industriistoj, en tiu Ekspozicio vizitota de multaj alilanduloj, vi certe diskonigis viajn produktojn en la tutan mondron, tial, ke ne nur Esperantistoj vizitos tiun Ekspozicion, sed ankaŭ ne esperantista publiko; ĉu parizanoj, ĉu provinçanoj, ĉu alilanduloj, kiuj ĉuijare dum sia libertempo vizitas Parizon, nepre ĉeestos tiun Ekspozicion; do per tio vi certe ricevos profitojn.

Do, senprokraste sendu vian aliĝon, por ke ni preparu lokojn, ĉar kredeble pro troaj aliĝoj, la lokoj mankos kaj nur la unuaj aliĝintoj ilin ricevos.

Por pluaj klarigoj, sin turni al Esperantista Komerca kaj Industria Asocio (71, rue Monge, Paris), sendante respondkuponon aŭ poštmarkon por respondo.

Por la Konsilantaro,

A. LECLERC, *la Prezidanto.*
A. SÆTENS, *la Generala Sekretario.*
E. HOUART, *la Generala Kasisto.*

**Esperanto in 1913.**

Reprints of this useful article, appearing in March "B.E." have been prepared in 42 pp. form. Price 2s. 4d. per 100, post free.

Libraro kaj Gazetaro.

Si, la Tria.—Humora rakonto el la vivo de artistoj, de Henryk Sienkiewicz (eldonita de Jan Günther, Varsovio.—Prezo ĉe B.E.A. 1s. 2p.).—Ci tiu novelo, tradukita plej vivastile de la fame konata A. Grabowski, estos ŝatata de ĉiu amanto de beletristiko. Gi prezentas okazojn en la vivo de du pentristaj kolegoj, kiuj logas kune. Unu, Svjatecki, estas tre stranga homo—vere orginala. Ĉiam li prenas por objektoj nur la plej funebrajn temojn kaj la plej bizarajn—laŭ sia propra esprimo, "kadavrulojn, kadavrinojn kaj kadavridojn." Lia kolego, per subita bonhanco, trafas famon, kaj tuj fariĝas la "leono" de Varsovia societo. La anonco pri lia fama bildo "Hebreoj super riveroj de Babilono" en la ĉiutaga "Fluganto" tuj rekondukas al li la amatinon, kies gepatroj antaŭe repuſis lin, sed nun trovas lin tre dezirinda. Sed subite gracia "diino" naĝas trans lia vido, kaj, por konatiĝi kun ŝi, li vestas sin kiel ukraina *did* (almozpetanto) kaj instigas malnovan amikinon lin enkonduki. Tiu amikino estas la Tria....kaj la lasta. La rakonto finiĝas feliĉe kaj gaje. La tradukinto estas tre malavara je novaj radikoj; tio ja estas specialo de la polo! Jen kelkaj ĉerpoj: p. 2, *ekzekuciisto* (sajne oficisto por "eljeti" logantojn el domoj); p. 7, *humideco*, malsekeco; p. 9, *patetika*; p. 48, *rivalizado*; p. 58, *diluita*; p. 70, *tredas*, surpaſas; p. 70, *hetero*. Sur p. 58, servisto "malfermas" pordon, kaj "apertas" large la okulojn. Mi demandis al mi kun krio, kial tiu servisto, se li ja bezonis fari ion tiel nekutiman, ne "uvertis" aŭ "uvris" la pordon!! Sajne la tradukinto preferas "melanholio" al la pli kutima *melankolio*. En la frazo (p. 57) "Mi kuras al la pordo, kvazaŭ al *brulejo*," la sufikso *ejo* ŝajnas ne bone uzita. Pli ĝusta estus *brulo* sen sufikso, ĉar loko (se oni esceptas la inferajn regionojn!) apenaŭ povas havi la karakterizon *bruli*.—Ci ĉio flanken, la libreto estas sprita, bonhumora kaj tre rekomendinda.—NORÉMAC.

Historio de Esperantista Movado en Saratov, 1887—1912 (eldonita de Librejo "Esperanto," Lubjanskij projezd 3, Moskvo, Ruslando.—Prezo 30 sd.)—Se oni volas scii, kiamaniere la propagando de Esperanto fariĝas en rusa urbo, ĉi tiu broſuro bone servos—spite sia nebona presaĵo—por prezenti ideon. La historio komenciĝas kun la laboroj de la fruaj pioniroj, trapasas en silento longan periodon ĝis la multaj provoj faritaj en 1906-10 starigi societon oficiale sankciitan. La malfacilajoj estas propraj al Rusujo. Dum kelkaj jaroj, ni legas, ekzistas malgrandaj disaj grupoj, ĉar societoj ne havis la permeson ekzisti. "Dua grupo el 6-8 homoj organiziĝis en loĝejo de unu instruisto de malsupra urba lernejo, S-ro V., k.t.p. Poste societo estis starigita, sed la "kutima malfeliĉo" ĝin trafis: "gia funkciado estas nepermesata de administracio." En Aprilo, 1910, nova societo en Saratov estis fondita kiel filio de la Tutrusa Ligo, kaj vigla periodo de agado komenciĝis. "Super ĉiuj atendoj, 200 homoj proksimume venis kursojn."....Sed denove la societo estas disigita, ĉar "la centra fako de la Tutrusa Ligo de l' Esperantistoj en Peterburgo estis fermata de l' administranto, kaj kune kun gi ĉesis ekzisti ankaŭ la Saratova societo, kiel la filio de la Ligo." (p. 31). Tamen malgraŭ ĉiuj malfacilajoj kaj "malfeliĉoj" Esperanto sufice floras en Saratov. "Antaŭ nur du jaroj estis malfacile trovi en ia Saratova librejo broſureton pri Esperanto; sed nun ĉiuj posedas provizon da lernolibroj kaj vortaroj" (p. 34). Oni takas la nunan nombron da interesatoj en Saratov je "ĉirkaŭ 800—900 da Esperantistoj aŭ Esperantemuloj." La historio estas dokumento tre naive skribita; ĝi ne kaſas la malfortajn flankojn de la organizo. Bedaŭrinde multaj preseraroj entrovigas, sed tion oni devas alskribi al la malfacilajoj specialaj al Rusujo.—NORÉMAC.

Siberio.—Volumaro de originalaj kaj tradukitaj verkoj. *Ia volumo. TRANSAJKALO.* De Pastro Innokentij Serišev.—Eldonajo de la Centra Komerca Oficejo. (Ricevebla ĉe B.E.A. Prezo 3\$. 4p.).—Estas rimarkinda fakto, ke inter la Esperantistaj verkistoj, la unuaj kaj la plej lastaj, kiuj liveris al ni tre altklasan literaturajon, estas rusoj; kaj al tiuj samideanoj, kiuj uzas nian karan lingvon laŭ tute natura maniero, ni multon ŝuldas. La verkinto de la libro, kiun ni nun konsideras, apartenas al la supre nomita kategorio kaj meritas unuarangan lokon. Li bone sukcesis produkti verkon beletristikian, kiu de komenco ĝis fino estas tute interesplena—ĝi kaptas la leganton, kaj spite la diverseco de la apartaj ĉapitroj, ĝi tenas tiun ensorĉitan. Kaj kia estas tiu ĉi mirinda libro? Pri kio ĝi traktas? Kial mi ĝin laŭdas? Paciencon, leganto. Vi mem devas mendi kaj legi ĝin, ĉar mi estas certa, ke lia ĉefredaktora moŝto neniam volus lasi al mi sufice da spaco por ĝin priskribi detale. Mi do nur elcerpas kelkajn frapajn paragrafojn, pri tiu granda, mistera, preskaŭ al ni nekonata lando, kies nova Kolumbo estis nia amiko, Pastro Serišev.

Siberio estas tiel granda, ke ne eksistas nur "Siberia Demando" sed "Siberiaj Demandoj"; kaj tiaj demandoj pri la Siberia vivo, geografia karaktero, ekzilitoj kaj nomadoj, kuraclokoj, gazetaro, lernejoj; ili demandas baldaŭan solvon.

"En vastaj rondoj de instruitaj Eŭropaj landoj, sufice proksimaj de Siberio, oni nenion scias pri ĝi, kaj se eĉ oni scias ion, tiu scio estas tute malvera. Verdire, ekzistas en fremdaj landoj diversaj esploristoj, kiuj multfoje travojaĝis Siberion, verkis ŝatindajn, *seriozajn* traktatojn kaj publikigis multekostajn, sciencstile skribitajn librojn; sed la vasta publiko tute ne legis ilin, ĉu pro seriozeco de la verkaĵo, aŭ pro altkosto de la libro. Krom tio, ekzistas landoj, kie tiaj seriozaj verkoj eĉ ne estas troveblaj. Jen kial pri Siberio ordinare oni scias aŭ nenion aŭ nur diversajn fablojn, multajn malverajojn, sensencaojn—eĉ mirindajojn: jen kial multaj fremdaj spekulaciistoj, profitante la scivolemon de l' vasta publiko, elpensas diversajn strangajojn pri Siberio kaj Eŭropa Rusujo, kaj pliriĉigas sin trompante la kredeman legantaron." ... "Estas multe dirite kaj priskribite pri Siberio, sed ĝis nun oni ne ankoraŭ elstudis ĝin detale. Ĝi estas varia; malsama en siaj diversaj partoj—tial estas aŭdata pri ĝi la plej malakordaj sciigajoj. La alvenintaj el Rusujo homoj enventuradis en ian apartan regionon de Siberio, priskribis ĝin, kaj la publiko iamaniere kredis, ke la tuta Siberio similas la priskribitan parton. Jen oni diras, ke Siberio ne estas tero, sed paradizo; jen oni rakontas, ke ĝi konsistas nur el densega arbarego kaj marĉoj sub eterna neĝkovrilo, kie okazas teruraj frostoj, kaj kie sovaĝa bestaro vagadas sur la vastajo." La vero estas, ke oni tro ofte ĝeneraligas. Siberio estas okupata per homoj plej diversaj; de la punlaboristoj-mortigistoj ĝis la honestaj herooj, kiuj defendis la liberecon de l' popolo.

Kiu deziras konatiĝi kun Siberio, por vidi ĝian fundamenton, tiu devas antaŭe konatiĝi kun Siberia vilaĝo. Tia vilaĝo speguliĝas en la ĉapitro pri "mia parojo." Malfacile estas al la vilaĝanoj vivadi: ili estas ĉirkaŭitaj per krutaj arbaraj montoj...ne estas ricevata bona rikolto...estas tre malfacile plugi sur krutajoj. La herbo kreskas malbona, la pluvoj dum falĉado ne permisas sekigi la falĉitan herbon kaj la fojno estas ricevata malbonkvalita. Pro malesto de bonaj paſtejoj, la vilaĝanoj havas malmulte da brutaro. Maſinoj estas multekostaj, kaj plejparte ne taŭgas por la kondiĉoj de vivo kaj laborado.

"Unu tre serioza demando estas pri la drinkemo en la Siberiaj vilaĝoj, ĉar drinkas ne nur la maljunuloj sed

ankaŭ la junularo. Alkoholo....ĝi ja estas abunda kaj malmultekosta."

"Alia afero estas, ke la medicina helpo, kiel ankaŭ la aliaj faktoroj de kulturo—agronomio, popolinstruado, bestkuracado—estas, en Siberio, tre malbone aranĝita. Multaj lokoj eĉ tute ne havas malsanulejon, nek kuraciston, nek akuſistinon, nek ian apoteketon."

Ne malmultajn dankojn al la eldonisto de tiu ĉi volumo, kiu estas bone presita kaj havas bonan formaton. Neologismoj kaj preseraroj estas tre maloftaj, kaj mi povas sentime rekomendi ĝin al la Esperantistaro.—SOLOM.

Albumo de Japanaj Vidajoj kaj Moroj, reproduktitaj kun permeso de *Tecudo-in* (Registara Fervoja Oficejo) kaj priskribitaj esperante de Ingéniero K. TAKAHASHI, Del., U.E.A., *Otimachi 8-Come, Hiroshima.* Prezo, 3\$. 6p.—Jen vere bonega propagandilo por ĉiu Esperantisto interesata en la bela Japanujo kaj ĝiaj artoplenaj logantoj. Ĝi konsistas el grandformata (25 c.m. x 18 c.m.) broŝuro, lukse bindita laŭ japona stilo kaj kun kovriloj designitaj ankaŭ japanmaniere, enhavanta kvindek el la plej belaj, bonege reproduktitaj fotografioj de Japanujo kaj de ĝiaj moroj, ĉiu akompanata de priskribaj notoj en la japana lingvo kaj en bonstila Esperanto. La verkinto diras en la antaŭparolo "Mi longe intencis pri tio, ke mi iamaniere povu kontentigi, per nia kara lingvo Esperanto, multenombrajn fremdajn samideanojn, kiuj estas, sajnas al mi laŭ la korespondadoj kun ili, tre scivolemaj pri nia lando, Japanujo. Felice lastan aŭtunon, mi kaptis okazon por atingi la celon: oni eldonigis ĉe nia Registara Oficejo dikan albumon nomitan *Sights and Scenes of Fair Japan.* Mi do petis al la Registaro, ke ĝi permesu al mi fari la malgrandigitan reproduktacion, kaj aldoni esperantajn priskribojn. La Registaro afable koncentis." Ni povas tre varme rekomendi la albumon.

La Esperanta Vortfarado, de Paul Fruictier.—Se ni sopiras al la fina triumfo de nia komuna idealo, ni devas antaŭ ĉio zorgi por individue konigi kun la detaloj de niaj komuna lingvo. Do la demando: kia estas tiu lingvo, kiun ni penas disvastigi tra la mondo, estas plej grava demando por ĉiu fervora Esperantisto; kaj sendube la ĝusta respondo estas: La lingvo Esperanto estas tiu montrita en la verkoj de nia granda instruanto Zamenhof, kaj precipite en tiu parto, la Fundamento, kiun la Esperantistaro akceptis, kiel oficialan gvidilon. Por ĉiuj tiu fonto estas libera, sed strange kelkaj homoj preferas ĉerpi kotan akvon, citante la opiniojn de Sinjoroj X., Y., Z., kiuj mem eble ne ĉerpis el la pura fonto. Tial mi gojis trovante la modestan pretendon de S-ro Fruictier pri sia libro, "kiu," li diras, "verdire estas ne tiom mia propra verko, kiom nova prezentado de la malnova, sed neanstatauebla, *Ekzercaro de D-ro Zamenhof.*" Kiuj amas analizi siajn pensojn kaj trovi racian fundon por siaj esprimoj, tiuj trovos en tiu ĉi libro multe da meditinda materialo. La aŭtoro traktas klare kaj fidele ĉiujn punktojn laŭ sciencia kaj orda maniero; tamen mi devas konfesi, ke li kelkafoge tiras konkludon, kiu ne rekomendas sin al mia aprobo—estus mirinde alie. Tre prave li insistas pri la oportuneco ricevita el la senca larĝeco de niaj derivitaj vortoj. Tiu larĝeco, aŭ neprecizeco, aparte konvenas por internacia lingvo, kiu devas rilatiĝi kun diversaj naciaj lingvoj, sed pro ekonomio evidente ne povas provizi ĝustan ekvivalenton por ĉiu oportuna vorto staranta en ĉiu nacia lingvo.—A.E.W.

Oficiala Jarlibro de Universala Esperanto-Asocio, por 1914.—En tiu ĉi jaro, la sesa de ĝia apero, ĝi estas ankoraŭ pli ampleksa ol antaŭe. Detale trakuri ĉi tie la titolojn de la enhavo de ĝiaj 304 bele presitaj paĝoj, estus neeble; mi nur povas diri, ke ĝi estas ĝis-rande plena je statistiko kaj informoj, jen generalaj,

jen pri turismo, jen pri la U.E.A. mem. Al tiu Esperantisto, kiu nepre ne volas aniĝi je tiu viveganta kaj entreprenema Asocio, mi konsilas, ke li evitu malfermi tiun Jarlibron, ĉar ĝi estas muskaptilo, kies logilo estas proponitaj servoj, kaj kies baroj malliberigaj estas plenumitaj promesoj. Tre imponanta estas la geografia karto, kiu montras la disvastiĝon de la Asocio tra Eŭropo.—A.E.W.

La Revuo (Aprilo).—“Le Rabeno de Baharah” (H. Heine) estas daŭrigata en ĉi tiu numero; jen kelke da notindaj esprimoj, neologismoj, k.t.p.: *Mia brako estas malforta, mi havas sur mi fontanelon* (med., *anat. an issue, fontanel*)—li *lasis sin mortpafi* por ni (he *let himself be shot for us*)—Jekel-Malsagulo jetis sin denove en siajn *pajacafojn* (*pajac-o, pol. pajac, angl. buffoon, jester, fool,*) kaj parolis plue kun krakanta tono de gajigisto—tiam mi pafos per mia pafilo *tra la kradan aperturon* de la pordego (then I shall shoot with my gun *through the grated opening of the gate*).

Aliaj artikoloj estas “La unua ‘Marseillaise’ el Bohema pulmo” de la konata bohema verkisto J. Arbes, bonege tradukita de Alexander Zahel; “La Amigilo,” farsa komedio originale verkita de J. G. Pyke el Melbourne; “La Milspesmila Papermono,” legendo el la *Sercoj de Vulpes*, de la hungara satiristo Kálnoki, tradukita de P. Balkányi; versajoj, inter ili du pecoj por kanti, tradukitaj de Ūoago; “Bahia Penso”; kroniko internacia de la monato, precipe pri Hungarlando, Aŭstralio, Usono kaj Germanujo.

Aliaj Verkoj Ricevitaj.—*Titolaro de Esperantaj verkoj tradukitaj el la franca lingvo, 1887—1912*, 24-paĝa broŝuro, eldonita de Esp. Biblioteko de Georg Davidov en Saratov, prezo: Sm. 0.250 ĉe Presa Esperantista Societo, Paris kaj G. Davidov, poštkesto 12, Saratov, Ruslando.—*Titolaro de Verkoj en kaj pri Esperanto* aperintaj en Belgujo de 1894 ĝis 1913, komplilis Arth. Vermandel, 30-paĝa broŝuro, prezo: fr. 0.50 ĉe Duukkerij “De Vlijt,” Nationalestraat, 54, Antwerpen.—*Kelkaj Vortoj pri la Lupoj en Saffeloj*, verkita ruse kaj Esp. de N. N. Foss, Ufa, Rusujo, prezo: 2 kopekoj ĉe la aŭtoro.—*Handelsbrievenboek Esperanto-Nederlandsch*, kolekto da komercaj letero, k.t.p., en la Holanda lingvo kaj Esperanto, farita de la Rotterdamsche Esperantisten-vereeniging “Mercurio,” 130 paĝoj, ricevebla ĉe W. Zwagers, Rotterdam, prezo: Fr. 0.90.—*Pri Solidareco inter Esperantistoj*, raporto farita en rusa lingvo dum jara kunveno de Kovna Esperantista Societo, tradukis B. Kotzin, 12-paĝa broŝuro, prezo: 10 Sd. ĉe K.E.S., Kovno, Rusujo.—*Bozen-Gries, Guidfolio tra*. Eldonita de la libera rondo Esperanto sub la aŭspicioj de U.E.A.—*Bad Reichenhall, la regno de la germanaj alpobanejoj*.—Nova kaj bele kolorigita Esperanto-Prospekto de tiu ĉarma loko, kiun la “Kurverein” Bad Reichenhall volonte sendos senpage al ĉiu petanto; helpu la klopodojn de la loka Grupo Esperantista petante ekzempleron.—*Vojagoj por Esperantistoj*, 16-paĝa broŝuro, bele presita kaj ilustrita, eldonita de la ĉie konata firma Thos. Cook kaj Filo, fondintoj de la tutmonda sistemo de plezurvojaĝoj, nun U.E.A. Entrepreno kaj Oficiala Agento por la Deka Kongreso en Parizo; petu ekzempleron kaj kongresajn sciigojn.—*Tri Rakontoj kaj Kelkaj Versoj* originale kaj Esperante verkita de Rafael de San Millan, 38-paĝa libreto, ricevebla ĉe “Homaro,” Pasaje del Comercio, 8, Madrid; prezo ne montrita.—*Bericht über den 9. Esperanto-Welt-Kongress in Bern*, 24-paĝa broŝuro en la germana lingvo pri la ga kongreso en Berne; eldonita de Esperanto-Auskunftsstelle, Zurich, ne aĉetebla.—“*Gorse in Bloom*,” verses by Peggy Lawford, the 13-year-old “girl poetess of Devon,” and a budding Esperantist of promise. In the booklet are 13 delicately written little poems, with

portrait of the authoress. Her work has already met with a splendid reception, and many are the accounts which have been written and photographs published in the leading English journals. We hope there may soon be a time when she will not only write original English verse, but also original Esperanto verse. Copies of the booklet can be obtained for 7d. post free, from Mr. Wm. T. Hutchings, Kasisto de la Tri Urboj Grupo, 22, Ker-street, Devonport.—*Titolaro de Esperantaj Verkoj tradukitaj el la Angla Lingvo, 1887—1912*, 16-paĝa broŝuro, eldonis Esp. Biblioteko de Georg Davidov en Saratov, prezo 3p., ĉe B.E.A.

La Svisa “Esperanto-Auskunftsstelle” sciigas al ni, ke nia konata samideano, S-ro H. J. Unger, en Zürich (Svislando) nun laboras pri nova tre grava propagandilo. La libreto, kiu verŝajne aperos je la fino de tiu ĉi jaro, prezentos al nia propagandistaro riĉan sisteme ordigitan materialon pri la ĝisnunaj tutmondaj sukcesoj kaj progresoj de Esperanto. Ĉiujaraj aldonoj kaj kompletigoj zorgos pri daŭra laŭtempeco de la materialo. Speciale atentinde estas, ke la libreto sciigos nur tiajn sukcesojn, kiuj fakte ekzistas kaj ne dankas sian ekziston al la trogravigemo de malzorgaj gazetaj raportantoj. Tial S-ro Unger kontrolos ĉiun noton, kiun li volas enmeti en sian brošuron. Pri internacia enketo, baldaŭ farota por kompletigi kaj kontroli la ĝis nun kolektitan riĉan materialon, ni ankoraŭ raportos. Hodiaŭ ni nur volas atentigi nian legantaron pri tiu ĉi valora propagandilo, kiu certe multe utilos al nia movado, kontraŭbatalante per nudaj verajoj la blufemon kaj trograndigemon de certaj samideanoj, kiuj ankoraŭ ne komprenis la grandan respondecon de sia dangera agado.—OKULO.



Anekdoto.

Viro estis kurinta preter Sokrato dum unu el la promenadoj de la filozofo. Alia viro, kiu postkuris lin, kriante: arestu! arestu! haltis ĉe Sokrato kaj ripročis:

“Kial vi ne malhelpis lian forkuron? Li estas krimulo, mortigisto!”

“Mortigisto? Kion vi komprenas per tiu vorto?”

“Ne ŝercu! Mortigisto estas homo, kiu mortigas.”

“Bučisto?”

“Malspritulo! Homo, kiu mortigas alian homon.”

“Ha, jes, soldato.”

“Azeno! Homo mortiganta alian ekster milito.”

“Mi komprenas: ekzekutisto.”

“Idioto! Homo, kiu mortigas alian hejme.”

“Tre bone, kuracisto.”

La postkurinto foriris en la konvinko, ke li estas parolinta kun maljuna frenezulo.—El *Finna Esperantisto*.

Instruistino al dimanĉa lernantaro: “Kiu grava afero okazis je Paska Dimanĉo?”

Knabeto: “Tiu estis la tago, kiam panjo irigis paĉjon al la preĝejo.”—El *Finna Esperantisto*.

Redakcia Korespondado.

Mr. Ernest W. L. Fowler calls our attention to the following, which appeared in the April number of the *Monthly News Circular* of the World's Committee of Y.M.C.A.'s, published at Geneva. Truly a sign of the times and a needed word to those Christians who seem to consider the propagation of an International Language as an anti-Christian act.

The possibility of being understood by men "of every nation under heaven" was the first manifestation of the gift of the Holy Ghost to the Apostles on the day of Pentecost. Whatever interpretation may be given to this gift of tongues, there was evidently a philological miracle. At the time when their missionary work was commencing our Lord wished to endow his apostles with a marvellous instrument by means of which the Gospel could be proclaimed to every creature. Indeed the confusion of languages seems more and more a great obstacle, if not to the drawing together of the nations and individuals on economic and commercial ground, at least in that reciprocal intercommunication of soul and heart so necessary in the domain of thought and feeling.

Do we not feel this obstacle stand like a wall before us in our World's Conferences, when the impulses which move us towards one another in an intense desire for fraternal communion find themselves checked by the impossibility of speaking to one another, of communicating one's impressions, of exchanging ideas, of manifesting the affection which unites us? There is no doubt that the shake of the hand, the singing in which the voices unite, the prayers which join in common adoration and common intercession, are all full of significance. But how keenly one wishes to go farther than that, how one suffers through being close beside treasures of experience without being able to profit by it.

The World's Alliance eagerly strives to act as a link between the Associations, to create co-operation of ideas and action, but it is at the cost of laborious and imperfect translations; and even then it is only in three languages, and who could enumerate the number of languages spoken in our Association world?

Theoretically those who are connected with our Association work, at least the General Secretaries and the members of our Central and International Committees, ought to understand the three official languages of the Alliance. The knowledge of them ought to be exacted of those who have the privilege of taking part in our World's Conferences. But how many are there who could or would accept this condition?

And in the Committees where men meet who have come from the four quarters of the Association world, and in which difficult and delicate questions are sometimes discussed, what complications, what sources of misunderstanding, what difficulties in arriving at an expression common to the thought of all!

No doubt there are some to whom the knowledge of foreign languages is familiar, while others never succeed in speaking or understanding any other language than their mother-tongue, and then to save time one imperceptibly ends in using that language alone. But when it happens to be a rather knotty discussion, at what a disadvantage they are placed who are obliged to express their ideas on complex questions in a language which is not their own. How our co-operative force would be increased if with the solid and beneficial unity of spirit which exists there was a corresponding unity of language.

There is a logical parallelism and legitimate aspiration in that.

I do not know if God in His wisdom will grant to His children a renewal of the miracle of Pentecost, and if this profound need of unity which is felt in the Christian Church will receive the seal of the approbation of the Heavenly Father in the form of a new gift of tongues. But I cannot regard as absurd or superfluous the efforts of those who with indefatigable perseverance are working to propagate an international language.

I am not competent to estimate the relative value of Esperanto and Ido, or any other international language. But when I see the activity of the Esperantists, for instance, in enlisting new recruits, when I see that the New Testament in Esperanto has already reached its second edition, far from regarding that as ridiculous or of no value, I highly praise such courageous initiative, which, if it succeeds, will facilitate the solution of many international questions. I do not cherish the delusion that very shortly Esperanto or any similar language can be adopted as the world-wide Association language; but I believe that if this study were propagated little by little in our Associations, if in the new generations of Association members the adepts in the use of the new language increased in number it would be for the greatest good of our whole work. Once more perhaps we should see what appeared to be a very small and secondary cause produce great effects.

Let us not forget, however, that an international language does not create unity. Ours rests upon a foundation which is solid on other grounds. In all languages there is one word, perhaps the only one, which is always the same, understood by all, that is; Jesus. This name, which makes all hearts beat in unison, around which we group with the same impulse of love, and for the same service, this is the ground of true unity of the children of God.

The Music Student for March, in an article on "Women as Composers of Chamber Music," and under the sub-title "A Hint from Esperanto," has the following:—

It seemed rather that one had to chronicle a lack of doing—a state of things reminding one of the antinfernal region of the *Divina Comedia*. One was oppressed with a sense of negation—of not-doing, which was almost more deplorable than misdoing. Musing thereon produced a desire for some new word, which should express the condition of not-deed—this decidedly strange contrast afforded by music in front of the multitudinous achievements of women in other directions. An expert Esperantist rose to the occasion, and produced three portmanteau words in his wonderful language, which you shall hear. They represent the present, past, and future of people-who-do-not-do, and are as follows (if you want to pronounce them the final j sounds as if it were y, and the accent is always on the penultimate syllable):—

(a). Nefarantoj :—"Not-doing ones" (present or habitual).

(b). Nefarintoj :—"Not having-done-ones" (past).

(c). Nefarontoj :—"About-not-to-do ones."

The moral of these tenses is clear.

"Nefarantoj," those-who-have-not-done-in-the-past, certainly we have been, but by misfortune, not by fault; there have been insuperable barriers which have prevented women from being composers, but many of which have not been removed, and the time has come for us to feel ashamed if we are any longer "Nefarantoj"—habitual-not-doing-ones. Let us at last determine not to be classed among those-who-are-about-not-to-do, the "Nefarontoj."

La Grup-sekretarioj nepre legu la jenon, kiu montras bonegan okazon por propagando per helpo de la entreprenemo kaj malavareco de la *Turisma Societo de Finnlando*:

Jam kelkaj rimarkindaj Esperantistoj penis montri la praktikan valoron, kiun Esperanto nuntempe povas havi por la turismo. Sinjoro Parrish faris longan paroladvojaĝon tra la tuta Eŭropo, rakontante kaj montrante la belajojn de la malproksima Kalifornio, Profesoro Pitlik sammaniere propagandis por sia patrolando, k.t.p.

Elezistas unu lando, ne tiel malproksima al centra Eŭropo, kiel Kalifornio, sed tamen sufice malproksima por tie esti preskaŭ nekonata—lando, kies unika naturo, persistema popolo, juna civilizacio dum lastaj tempoj komencis altiri generalan intereson.

Ni parolas pri Finnlando, tiu “lando de lagmiloj,” pri kiu nespertuloj imagas, ke ĝi estas restadejo de blankaj ursoj, logata de duonsovaĝa popolo, kiu vivas sole per tenado de nordaj cervoj, pro sia severa klimato nelogebla de civiliza popolo. Lando, el kiu tamen komencis veni famoj—nekredablaj—tute ne konformaj al la antaŭa imago. Oni aŭdis pri kelkaj homoj, kiuj—laŭ sia opinio—estis ĝis tie, kaj tamen ne mortis pro frosto. Kaj tiuj homoj jam ion rakontis pri la beleco de la “malproksima” lando, ili uzadis la nomadon “lando de lagmiloj,” ili ion rakontis pri senfinaj arbaroj, pri virinoj sidantaj en la parlamento...sed nenian unuecan bildon oni ricevis per iliaj rakontoj, se oni eĉ kuraĝis kredi ilin.

La Esperantistoj, kiuj certe estas specialistoj en geografio, ja ne estas nesciantaj pri la ekzisto de tia lando, nomata Finnlando. Multaj el ili ja mem posedas kolektojn de finnaj vidajoj, per korespondado aŭdis tion kaj tion pri Finnlando, sed—ĉu ni eraras?—tio nur vekis ilian scivolon kaj intereson, restigante la deziron ankoraŭ plion aŭdi.

Konvinkitaj pri tio, ke ni ne eraras supozante, ke nia lando prezantas intereson al la tutmonda Esperantista kaj alia publiko, ni nun nin turnas al vi. Ni havas la ĝojon rakonti al vi, ke la Turisma Societo de Finnlando jam rimarkis la grandan utilon, kiun nia internacia lingvo povas alporti al ĝi, kaj decidis, imitante la cititajn pionirojn, iniciati Eŭropan paroladvojaĝon pri Finnlando. Sekve ni nun havas la okazon sendi nian sekretarion, studenton Vilho Setälä, por paroli pri Finnlando antaŭ Esperantista publiko. Ĉar ni esperas, ke la afero vin interesas, ni proponas, ke vi aranĝu al li okazon paroli en via urbo.

La vojaĝo de Sinjoro Setälä estas tiel planita, ke li ekveturos en Julio al Anglolando kaj daŭrigos sian vojon de tie tra Belgolando al Franclando, kie li partoprenos la Dekan kiel nia reprezentanto. Poste li sin direktos al suda Germanlando, Saksujo, Prusujo kaj Danlando, de kie li revenos nian landon per vaporŝipo. Eble li ankaŭ vizitos Bohemujon.

Sinjoro Setälä kunportos grandan nombron da lumbildoj, per kies helpo li parolos pri la finna naturo kaj finnaj popolmoroj. Li parolos nature nur en Esperanto, kaj vi devos resume traduki la enhavon al la publiko, se vi tion konsideras bezona. La ĉambregon kaj la lumbildan aparaton (por bildo 8×8 c.m.) vi devos havigi por lia senpaga dispono; la reklamon vi ankaŭ devos prizorgi, sed al li mem vi nenion bezonas pagi, kaŭze de la sufice subvencio ricevita de la Turisma Societo.

La kondiĉoj de ni proponataj do estas ekstreme favoraj, kaj konsiderante la propagandan signifon, kiun tia parolado ĉiam havas ili neniu devus timigi de la arango. Ni do atendas vian baldaŭan favoran respondon, kiu ebligos al ni fari definitivan planon kaj fiksi la daton, kiam Sinjoro Setälä vizitos vian urbon.

Rimarku, ke la nombro de la paroladoj estas limigita.

Ankoraŭ kelkajn vortojn pri la parolonto. Ke li havas intereson al la afero, tion pruvas interalie la cirkonstanco, ke per lia iniciato kaj plejparte ellaborita de li aperis dum pasinta printempo la libreto *Voyage en Finnland*, kiu ricevis tre laŭdajn kritikojn en la tutmonda Esperanta gazetaro. Dum kelka tempo li ankaŭ partoprenis en la redaktado de *Finn Esperantisto*, gvidis kelkajn Esperantajn kursojn kaj partoprenas kun fervoro en la propagandado deposit sia konatiĝo kun Esperanto.

Ni do kuraĝas esperi, ke vi plene fidas al nia entrepreno, kiu estas iniciatita kaj subtenata de la ĉi-tiea Turisma societo.

La estraro de Esperanto-Asocio de Finnlando,

HJ. J. RUNEBERG, *prezidanto, ano de L.K.*
ALBIN SANDSTRÖM, *vicprezidanto.*

WERNER ANTILA, *estrarano, ano de L.K.*

Respondoj Adresotaj.—Al SINJORO VILHO SETÄLÄ, Helsingforso, Merilinna, Finnlando, Eŭropo.

Flugfolio.

La tutu Esperantistaro devus plenigi la trian fakon, kaj zorgi nur pri la neesperantistaro.

Ĉiutage, en niaj internaciaj gazetoj, aperas artikoloj tute aplaudindaj, verkitaj de lertuloj, kiuj talente pruvas, ke Esperanto estas lingvo perfekte taŭganta por sia celo, ke Esperantismo estas neŭtrala afero, ke nia movado atencas nek la aliajn lingvojn, nek la naciajn sentojn, k.t.p. Sed tion ĉi, ni ĉiuj scias, ni Esperantistoj, kaj neniel bezonas esti konvinkitaj! Kial do, tiaj bonegaj artikoloj, anstataŭ aperi en internaciaj, ne aperas en naciaj jurnaloj, kie ili utile trafus la neesperantistan legantaron?

Ni organizas Esperantistajn festojn, vespermangojn, kunvenojn, ekskursojn...Bonege! Sed pli bone estus inviti al niaj ekskursoj, kunvenoj, vespermangoj kaj festoj varbeblajn homojn, kaj anstataŭ paroli en Esperanto inter ni, paroli pri Esperanto kun ili.

En niaj ĉiujaraj kongresoj, ni forparolas multekostan tempon, ni voĉdonigas niajn senpovajn delegitojn, ke ili starigu niajn senpovajn leĝojn, en zorge ŝlositaj ĉambrego, kien oni povas eniri nur per montrado de sia kongresa karto, ni longe pridiskutaĉas senutilajojn, ni kantas por ni mem nian himnon, ni nin salutas kaj intergratulas...Malbona metodo! Ni large malfermu ĉiujn pordojn kaj fenestrojn; ni plenigu ne ĉambrojn, sed stratojn; unuvorte ni kondutu, kiel triafakaj kongresanoj....Plenan volumon oni povus verki pri tiu temo; mi entreprenos tiun laboron, kiam mi havos sufice da tempo, t.e. neniam.

ERA.

El Lingvo Internacia (Marto, 1914).



Grava Peto!

Ekspozicio de ĉiulandaj vidajkartoj estas sendube la plej bona propagandilo por nia kara lingvo, ĉar kiem da homoj do ĉiam ree opinias, ke en la tuta mondo ekzistas nur tre malmultaj geesperantistoj! Por kontraŭdiri tiajn pensojn, mi decidis, aranĝi grandan ekspozicion da tutmondaj ilustr. poštarkoj kaj petas ĉiujn gesamideanojn, kiuj fakte volas kunlabori la efektivigon de nia sankta ideo, sendi al la ĉi-suba adreso il. p.k. de siaj urboj aŭ landoj. Laŭ deziro la ricevinto dankos per bela poštarko. Se la kolekto ampleksas sufice grandan nombron, ĝi certe formas belan kaj efikan suplementon al naciaj kaj internaciaj kongresekspozicioj, kaj povas esti uzota kiel rondironta ekspozicio dum propagandaj paroladoj kaj festoj.

Adresu al: OSKAR ZIEGLER, Miesbach-Neumühle (Oberbayern), Germanujo.

Esperanta Progreso Alilande.

La Saksa Esperanto-Instituto en Leipzig.

Unu el la plej grandaj sukcesoj de la Dresdena esperanto-mondkongreso estis la fondo de la Saksa Esperanto-Instituto en Dresdeno. La 12an de Novembro, 1908, ĝi estis subigata, laŭ edikto N-ro 1610, III. F., al la reĝa saksa ministerio de la internaj aferoj, kaj de tiu tempo ĝi fariĝis institucio, kiu ĝuas grandan altestimon ne nur en la patrujo sed eĉ ekster la limoj de Germanujo.

Pro diversaj kaŭzoj la S.E.I. troviĝas de la jaro 1913 en Leipzig, kie ĝi posedas en la ejoj de la "domo por libroindustrio" (Buchgewerbehaus) vere idealan hejmon. En bela, bone lumigita legĉambrego ĉiu vizitanto povas legi la plej diversajn esperantajn gazetojn. Krom lunde la salonego estas ĉutage malfermita de la 9a matene ĝis la 2a kaj de la 7a vespere ĝis la 10a. Plej grave estas, ke ankaŭ la "Reĝa Esperanto-Biblioteko" troviĝas en la domo. Estas tre facile, serĉi laŭ la plej moderna kaj praktika katalogo la numerojn de la dezirataj libroj, kiujn la dekoranta oficisto tuj alportas. La biblioteko enhavas la plej grandan parton de la esperanta kaj priesperanta literaturo. Ankaŭ gravaj verkoj pri antaŭaj provoj de mondlingvo, pri la historio de la mondlingva problemo, pri "volapük" k.t.p., ne mankas. Ĉiam oni zorgas pri kompletigo de la biblioteko akirante novaperintajn librojn kaj kolektante plenajn jarkolektojn de gazetoj. Estas tre dezirinde, ke aŭtoroj donace sendu ekzemplerojn de siaj verkoj, por ke la Reĝa Esperanto-Biblioteko fariĝu vere kompleta kolekto de la tute mondlingva literaturo. Laŭ la biblioteka regularo la senpaga prunte-prenado estas permesite al ĉiu persono loĝanta en Germanujo. Por eksterlandanoj antaŭa petskribo estas necesa. La biblioteko estas multe uzata, 5,123 volumoj estas prunte-donitaj ĝis nun, 2,031 eksteren.

La devo de la S.E.I. estas, lernigi la help-lingvon al ĉiuj partoj de la popolo. Precipe grava estas la plua postulo, instrui la lingvon al la geinstruistoj kaj ekzameni ilin, por ke, se la ĉefa celo, la enkonduko de esperanto en la lernejojn, estos atingita, tuj aro de Esperantaj instruistoj estas preta. La nombro de la personoj ĝis nun instruitaj de la S.E.I. estas tre granda, ĉar 2,260 personoj vizitis ĝiajn kursojn. La apartaj kursoj por geinstruistoj estas vizitataj de 82 personoj. La ekzamenoj de la Instituto estas duspecaj. Kiu celas havigi al si la "ateston pri lingva kapableco," devas plenumi skriban ekzamenon. Per ĝi oni devas pruvi sian kapablecon, korespondadi esperante. La posedo de tiu atesto estas tre grava por

oficistoj en la komerca fako, ĉar baldaŭ ankaŭ ĉe la okupo de oficoj esperanto iudos grandan rolon. Pli malfacila estas la ekzameno pro la "atesto pri instrua kapableco." Ne nur diversaj tradukoj sed ankaŭ originalaj laboroj laŭ donitaj temoj estas postulataj. Per instruaciono la ekzamenatoj devas montri, ke ili estas kapablaj instrui.

Ankaŭ rilate al komerco kaj industrio la S.E.I. sukcesplene laboris. Ĝi tradukis kaj eldonis katalogojn kaj prospektojn, utilis al multaj firmoj tradukante komercajn leterojn, rekomendis la fabrikajn de la saksa industrio en eksterlandaj gazetoj kaj sendis esperantajn katalogojn al eksterlandaj eksposicioj.

La nuna okupo de la S.E.I. garantias ĝian pluan floradon. Policanoj, poŝtoficistoj, oficistoj de la mondekspozicio estas instruataj en diversaj kursoj. Ilustrita libro pri Saksujo estas verkata kaj eldonata de la Instituto. Ankaŭ la esperanto-pavilono en la mondekspozicio por libroindustrio kaj grafikaj artoj — sukceso de la direktoro de la S.E.I. D-ro Schramm, kiu estas samtempe sciencia direktoro de la mondekspozicio — montras sufice la gravecon de la Saksa Esperanto-Instituto.

WALTHER HAHN.

Nederlando.— Dum la *pola nacia kongreso*, okazinta la 1an kaj 2an de Novembro, 1913, en Winterswyk (Gelderland) la Esperantista grupo en Groenlo (apuda urbo) faris bonan propagandon. Helpate de kelkaj polaj samideanoj la Groenlo'anoj disdonis milon da rule-presitaj folietoj kaj grandan kvanton da ŝlosiloj Ĉefecaj. La estonteco montros la efikon!

La Haga klubo de tramistoj "Ĉiam Antaŭen" elpensis *novan propagandilon*. Oni presigis malgrandajn kartojn kun oklingva avizo, ke "la donanto ne povas kompreni kaj respondi, ĉar li konas krom la nacia lingvo nur Esperanton." La konduktoroj transdonas tiujn kartetojn al eksterlandanoj, kiuj alparolas ilin en fremda lingvo. Bonega propagandilo por tiuj, kiuj ofte interrilatas kun vojaĝanta publiko.

La Holanda Pioniro aperis en nova vesto (brošurformo) laŭ deziro de plejmulto el la legantoj. La redakcio diras pri tio, ke en multaj okazoj la sukceso de iu afero dependas de ĝia formo, tamen por propaganda gazeto la ĉefa afero estas la enhavo. Estas ladeziro de la redakcio, fari la organon kiel eble plej leginda kaj alloga, kaj ĝi petas por tio la kunhelpon de aliaj. Interesajn komunikojn pri la movado oni bezonas antaŭ ĉio, sed bonstilaj literaturaĵoj ankaŭ estos volonte enpresataj tiom, kiom la spaco permisos.

La *urbestraro de Hago* nun decidis organizi novan esperantan kurson por plenaĝuloj. La

partoprenintoj de la antaŭa formis klubon sub la devizo. "La persistanto progresos."

En diversaj lokoj malgrandaj grupoj estis fondataj kaj novaj kursoj komencataj.—J.Z.

Hinujo.—La dua jaro de la starigo de la Centra Oficejo Hina Esperantista Asocio jus finiĝis; jen kelkaj ciferoj pri la laboro farita:—

	1913.	1912.
Komunikaj ricevitaj	5039	2411
" forsenditaj	6113	3192
Vizitantoj al la C.O.	359	105
Regionaj Oficejoj	28	17
Membroj	919	396
"Korespondaj Kursoj" venditaj	2650	1230

La supre donitaj ciferoj, komunikitaj de S-ro K. Ĉ. Ŝan, plene montras, ke nia afero certe ne velkas en Hinujo. Koran gratulon al niaj hinaj kunbatalantoj!



Sardiniaj Moroj.

Unu el la plej strangaj popolfestoj en Sardinio estas certe tiu de Sankta Antono en Lula.

Frumatene junulinoj kaj virinoj, are alportante orangselojn, mielon, migdalojn kaj aliajn lokajn produktajojn, kunestas en la Priora domo por pretigi la orangtrinkaĵon, kiu devos vespere malsoifigi la tutan loĝantaron. Posttagmeze sur la vilaĝa placo estas starigata granda poplo, sur kies altega pinto oni pendigas belajn donacojn. Sed por ilin akiri necesas, ke kuraĝaj junuloj maltimu la fumegan fajrumon de kvin bruligantaj ĉaroj plenŝargitaj je rosmareno, kiu ĉirkaŭas la poplon. Post pastra beno, la maltululoj kune sin jetas antaŭen al arbo tra kaj trans la fumnubo blindiga kaj sufoka, kiu ilin kaſas antaŭ la rigardantoj kaj devigas ilin perforte interpuſi unu la alian. Post unua alkuro, multaj revenas lacigitaj, aliaj reprovas la atakon, sed nur unu fine atingas la celon ĝis la pinto de l' poplo kaj gajnas la premion. La venkinto, estas bruege aklamata de la popolamaso, kiu lin kondukas hejmen en gloro, ĝojege laŭte kantante kaj ludante. Tie oni disdonas al ĉiuj vilaĝanoj la orangtrinkaĵon, por refreſigi la eluzitajn gorgojn, kaj la gaja festeno daŭras la tutan vesperon.

El *Itala Esperantisto*.



El la Kazerno.

Sergento (al rekruto, kiu en la gimnastikejo vane klopodas grimpi sur maston): "Kaj tia viraĉo pretendas, ke li devenas de simioj."—El *La Verda Standardo*.

La Meksika Armeo.

Korespondantino mia, kiu logas en Esperantujo, sendis al mi antaŭ nelonge eltranĉajon enhavantan artikolon, kiun verkis fremda raportisto, speciale sendita de la estroj de sia gazeto, por studi tie ĉi niajn morojn kaj tiel plu.

La afero, pritraktita en la citita artikolo, estis tiu pri nia armeo. La verkisto konkludis, ke nia armeo, esceptante la estrojn kaj oficirojn, estas aro da friponoj.

Mi ne miras pri tiu ĉi konkludo, ĉar oni bone scias, ke la pluparto el raportistoj sur la tuta mondo verkas siajn "fantaziojn," festenante kaj elspezante gaje la monon, ne sin priokupinte pri la studio de la radikoj de la sociaj, politikaj aŭ religiaj problemoj.

Oni pretendas, ke ĉiu soldato en nia armeo estas eksrabisto kaj, ke la registaro malplenigas la malliberejojn por plenigi ties vicojn. Ankaŭ oni diras, ke la virinoj estas devigataj militservi kaj cetere.

La legantoj, kiuj fidos la ĝustecon de tiuj ĉi senskrupulaj raportoj, ricevos malpravan ideon pri la alilandaj popoloj; sed nun, dank' al Esperanto, oni povas konigi la veron al la malproksimaj loĝantoj en fremdaj landoj, jam ne havante inter ni barojn kontraŭ la reciproka komprenejo. Mi penadas, do, konigi tion, kio efektive estas la meksika armeo.

Ĉe ni ne ekzistas la ĝeneralaj devigaj servoj, nek ankaŭ la volonta rekrutigo, kiel en Britujo kaj Usono.

Nur niaj kamparaj policaj regimentoj, nomataj "Rurales," estas formataj per memvoluloj, kiuj uzas la nacian kostumon por rajdi, t.e.: enfenda pantalone farita el cerva ledo, mallonga ornamita jaketo el la sama ŝtofo, ruĝa kravato kaj la konata granda ronda ĉapelo, ornamita per argentfadenaj brodajoj kaj la numero de la regimento. Ankaŭ la selo estas laŭ la nacia modelo kaj, kiel armilojn, ili portas sabron, karabenon kaj revolveron. La longa ŝnuro, tre lerte uzata de niaj kamparanoj por ligi ion aŭ iun je interspaco de kelkaj metroj, ne mankas al la "rurales."

Sed la regula armeo ne kalkulas inter siaj soldatoj verajn memvolulojn. Kun kelkaj esceptoj, ĉiu soldato signifas ian maljustaĵon, vengon, malbonaĵon aŭ krimon, ĉu de iu registo, ĉu de iu potenca persono kontraŭ la malfeliĉaj enlanduloj...

Jam de la epoko de la Hispana Konkiero, restas la principio, ke la enlanduloj ne estas homoj, sed simplaj iloj uzeblaj por la potenculoj aŭ por la "pli altaj ranguloj." Nia mezklaso, kvankam senmona, pretendas ankaŭ esti katalogita inter la dorlotitaj filoj de la Dio Mono, ne priponsante, ke ni Meksikanoj ĉiuj, pli aŭ malpli, estas el la sama sango kiel la kamparaj

enlanduloj, kaj estas despota kaj malhumila kontraŭ tiuj senpatraj estaĵoj. Sekve nia mezklaso ankaŭ akceptas kiel tre naturan aferon, ke oni ŝargu al la humilegaj anoj la pezan militservon.

Niaj pasintaj legfarantoj fondis oficon nomatan "Jefe Político," kun la ideo, ke tiu ĉi publika servanto zorgadu en ĉiu distrikto pri la deca aplikado de niaj liberaj legoj, tiamaniere malebligante trouzaĵojn de la lokaj aŭtoritatoj. Tiu estis la bela teorio, sed fakte, iom post iom, la suprenomitaj inspektoroj fariĝis abomenaj subpremiloj de la guberniestroj kaj aliaj potenculoj.

Vidu, kiel ili rekrutadis kaj rekrutadas la nun "heroajn federalajn soldatojn":—

Vasalestro en vilaĝo enamiĝas en belulinon, sed tiu ĉi ne sentas amon al la enamiĝinto. La vasalestro insistas kaj uzas ĉiujn perojn por akiri tiun koron, aŭ pli klare por kontentigi siajn bestajn instinktojn, kaj ne sukcesinte, tiam fine diras al la malsatema fraŭlino: "Se vi ne amos min, mi sendos iun proksiman parencon vian en la armeon; mi estas, kiel vi scias, granda amiko de la Sinjore "Jefe Político." Ne miro, ke la vasalestro fariĝis "amata" de la fraŭlino, aŭ ke la minaco realigis.

Se la virino, kiu metis la fajron en la koron de la influantulo, (tio ĉi estas retorika figuro, ĉar tiaj ne havas koron) estas edziĝinta, kaj la edzo baras la vojon, oni sendas la "baron" en la armeon.

Enlandulo posedas teraĵeton, kiun vasalestro deziras aldoni al siaj bienoj. Estas du vojoj por ĝin ricevi: la vasalestro per sia advokato kaj donaco farita al la "Jefe Político," pruvas antaŭ juĝejo, ke la limoj de siaj bienoj trapasas la cititan teraĵon — se li estas najbaro de la viktimo — aŭ ke la dokumentoj, kiujn posedas la enlandulo pri la posedajo, estas efektive senvaloraj paperaĵoj. Kaj se la senigito protestas kontraŭ tiu rabajo, ankoraŭ oni sendas lin en la armeon...

Kelkaj vasalestroj aŭ aventuruloj estas tiel sindonemaj, ke ili "donacas" al la enlandulo, la dekonon aŭ dudekonon el la valoro de la teraĵo.

La "Jefe Político" de la distrikto ankaŭ faras modestajn profitojn el la "ebraj soldatoj." La sola plezuro ricevebla por la enlandulo — kampara laboristo — estas iri dimanĉe aŭskulti la dian voĉon de la katolika pastro kaj dronigi siajn dolorojn en la "pulque" (nacia trinkaĵo farita el agavo), kaj ofte finiĝas la "plezuro" en la Policejo.

Je la sekanta tago, la "Jefe Político" sciigas la malliberulon, ke oni sendos lin en la armeon, kiel puno pro lia malbona konduto. La familio de la estonta "defendant" de la

patrujo" penadas savi la parencon kaj turnas sin al amatora advokato de la vilaĝo, por ke li influu antaŭ la Mošta Jefe Político por liberigi la "soldaton." Sm. 20, 50, aŭ pli, estas la honorarioj de la leĝa defendant, el kiu sumo apartenas duono al la S-ro Jefe.

Ofte la negocpartropenantoj de la "Jefe Político" enspezas la honorariojn, kaj la "soldato" iras en la vicojn...

Bienposedantoj, industriistoj, negocantoj, k.t.p., kiuj rimarkas, ke inter siaj laboristoj estas iuj, kiuj deziras almenaŭ ŝanĝon en la metodoj subpremigantaj, sciigas tion al la "Jefe Político," kaj la nekontentuloj estas sendataj en la armeon.

Autoritato aŭ simpla najbaro, se li deziras fari venĝon kontraŭ iu, ne plu simpatia por li, denuncas lin kiel konspiranton, kaj la "Jefe Político" aldonas ankoraŭ unu rekruton al la armeo...

Kaj jam de unu jaro estas alia sistemo ankoraŭ pli pratika. Militestroj, kiuj estas en la regionoj, kie la revolucio estas aktiva, kiam ili eniras vilaĝojn, arestas ĉiujn, kiujn ili deziras, kaj sendas tiujn pacajn homojn al Meksikurbo, kiel MILITKAPITITOJN el imagaj batalegoj...

Oni razas al ili la kapon, metas sur ilin ĉukolorajn uniformojn, instruas ilin dum kelkaj tagoj, kaj ili estas siavice pretaj iri en la batalkampojn.

Preskaŭ ĉiutage oni povas vidi en la grandaj urboj, precipite en Meksikurbo, dolorajn karavanojn el ducent aŭ tricent malfeliĉuloj alkondukatajn de soldatoj, ĝuste kiel ili estus la plej grandaj malbonfarintoj sur la tero. Kaj flanke de tiuj ĉi "memvoluloj" marŝadas alia karavano ankoraŭ pli dolora: patrinoj, edzinoj, fratinoj, filoj, aŭ alia karaj parencoj de la viktimoj, kiuj sekvis ilin el la vilaĝo, kie la "Jefe Político" de la distrikto "rekrutis" ilin.

Estas kompreneble, ke inter la "rekrutitaj" anoj estas homoj senmetiaj kaj mallaboremaj, kiuj uzadis sian tempon malbone kaj meritis punon, sed tio estas tre, tre malgranda procento, kiu neniel pravigas la fakton, rigardi ĉiujn soldatojn kiel balaaĵojn el la societo.

Kiam la soldatoj estas sendataj al la batalado, multaj parencoj ankoraŭ sekvas ilin ĉien. Tiu ĉi fideleco, tiu ĉi nebrua sindonemeco partopreni la fizikajn kaj moralajn dolorojn sperteblajn dum tiu sovaĝa militado, honto de la nunaj tempoj, estas kortuſtantaj.

Miaj okuloj pleniĝas je larmoj, kiam mi rigardas tiujn ĉi heroinojn, portantajn sur la kapo grandan pakajon da siaj plej necesaj vestaĵoj kaj aliaj utilaj objektoj, kaj kelkfoje ankaŭ portantajn infanon sur la brakoj kaj kondukantajn duan knabon per la mano.

Se la vento blovegas, se la pluvo falas, se la suno bruligas eĉ la ŝtonojn, se la soifo mortigas

eĉ la bestojn, tiuj virinoj neniam plendas ekstere, neniam forlasas la karan kunvivanton; ĉiam ili estas pretaj fari la plej longajn marŝadojn kaj tre ofte eĉ estas ankaŭ viktimoj de la mortigantaj kugloj...

Miaj legantoj demandos, kial oni ne malpermisas, ke tiuj virinoj akompanu la soldatojn, sed mi devas diri al ili, ke se oni malpermesus tion, la federala armeo ne povus ekzisti. La "soldaderas"—nomo donita al tiuj heroinoj—estas tiuj, kiuj efektive zorgadas pri la rilata komforto de la soldatoj kaj kiuj kuraĝigas ilin dum la malesperantaj krizoj. Kvar jaroj estas la daŭro de tiu stranga militservo.

Estus pli juste, pli honora, kaj sendiskute preferinda, ke oni starigu la devigan servadon, kiel en Franclando, se oni ne povas pagi memvolulojn, kiel en Britujo aŭ Usono.

Tiam, nur la needzigitaj junuloj el ĉiu rangoj fariĝus la soldatoj, kaj oni ne plu rigardus tiun ĉi servon kiel punon aŭ kiel ŝargon speciale elpensitan por la malfeliĉaj enlanduloj, kies gronda krimo estas, esti naskitaj el humilaj gepatroj...

Nu, pri la estroj kaj oficiroj, ordinare membroj de nia meza kaj alta klasoj, kies eniro kaj plialtigo en la armeo baziĝas sur nepotismo kaj intrigado, estas pli bone ne paroli. La silento estas ora.

Kaj nun, karaj gelegantoj, kiam vi legos raporton pri la meksika armeo "formita el rabistoj," rememoru la Moštajn "Jefes Políticos," kaj mi estas certa, ke via simpatio restos je la flanko de la "Juanes" — Johanoj-nomo ankaŭ donita al la soldatoj — kaj la heroaj "soldaderas," kaj ankaŭ vi ne miros, kial revolucio estas ĉe ni.

Originale verkita de E. E. GUERRA.



El "Gitanjali" de Rabindranath Tagore.

[*Cu tiu ĉi poemo estas pri Esperanto?*]

Vi konigas min al amikoj, kiujn mi ne konis.
Vi donis al mi sidejojn en hejmoj ne miaj. Vi faris proksima la malproksiman kaj faris min frato de la fremdulo.

Mi malkvietaĝas en mia koro, kiam mi devas forlasi mian konatan hejmon; mi forgesas, ke restas la malnova en la nova, kaj tie vi ankaŭ restas.

Tra nasko kaj morto, en tiu ĉi mondo kaj en aliaj, kien ajn vi kondukas min estas vi, la sama, la kunulo de mia sensina vivo, kiu ĉiam katenas mian koron al la nekonata per la katenoj de ĝojo.

Kiam oni konas vin, tiam fremda estas neniu, tiam neniu pordo estas fermita. Ho, plenumu al mi mian preĝon, ke mi neniam perdos la feliĉecon de la tušo de la unu en la ludo de la multaj.—*Tradukis W.M.P.*

Dante, the Italian Poet, in a New Light.

Dante Alighieri (1265—1321), the author of the "Divina Commedia," the father and mastermind of all modern so-called world or international languages:

Cosi ha tolto l' uno all' altro Guido
La gloria della lingua: e forse è nato
Chi l' uno e l' altro cacerà di nido.

Dante, "Purgatorio," Canto XI.

Scrisse in versi e in prosa; in vulgare e in latino.

Fu quasi il creatore di Nostra lingua, che inalzo al altezza non superata e forse non superabile.

F. Ugolini.

In giving here the two quotations in the original it is not intended to enter into any elucidation or explanation as to their meaning. Linguists and students of languages can formulate their own deduction. It appears, however, to be certain that the Vulgare of Dante was then considered a new language, largely evolved by him (e chi con esso), so that he was "quasi" its author. The Vulgare was neither the vernacular Tuscan nor Latin of his time, as history tells us that when Dante, as peace envoy to the Republic of Venice, was addressing the Senate in Vulgare, he could not be understood, although the Senators knew both Tuscan and Latin.

Through Dante's writings, more so than by his contemporary rivals, and particularly on account of the peculiar fascination the "Divina Commedia" had on his countrymen, the Vulgare became in succession the Tuscan idiom, the language of Central Italy, the written language of the Italian nation, and a world-language, la voce divina del sublime canto, the wonderful charm of Italian grand operas, cantatas and oratorios.

B. F. SCHUBERT, Washington, D.C.



"De" aŭ "Per"?

(En teatro; du samideanaj sinjoroj, mezaĝa mondulo kaj junulo).

Junulo: Si estas vere belega knabino! Rigardu tiun belan kapeton riĉekovritan de haroj — tiun ravan bušeton ornamitan de perloj! tiun —

Mezaĝulo (skeptike ridetante): Kovritan *per* — ornamitan *per* estus pli... Zamenhofe — ĉu ne?

Junulo (post paŭzego — lornetinte denove la belulinon): Kruela troprecizo! neindulga lingvo!

Mezaĝulo (cinike): Kvinpinta stelo necese pikas kelkafoje — eĉ rilatante belan virinon.

LE LYS.

Dolca Dormo de la Malriculoj.

El "Henriko IVa," de W. SHAKESPEARE.

Kiom da miloj el regatoj miaj
Je tiu-ĉi nokthoro dolē dormas !
Ho, Dormo, paca Dormo ! flegistino
Karesa de Naturo ! kiel mi
Vin fortimigis tiamaniere,
Ke vi ne plu konsentas ferm premeti
Palpebrojn miajn ; ne plu vi bonvolos
Trempo la miajn sentojn en forgeso ?
Kial vi kušas en fumplenaj litoj,
Sur krudaj pajlmatracoj vin sternante,
Kaj dormigate de noktmušoj zumaj
Plivole ol en bonodoraj ĉambroj
De altranguloj, sub la baldakenoj
De multekosta pompo kaj parado,
Lulate per plej dolēaj melodioj ?
Kial kun la malnoblaj vi kušadas
En abomenaj litoj, stulta dio,
Lasante la kušejon mian regan
Kvazaue pošhorloĝo malkvieta
Aŭ tumultsonorilo senripoza ?
Ĉu vi, sur alta kaptturniga masto,
Sigelos la okulojn de l' ŝipbubo,
Kaj lullos lian carbon en lulilo
De l' kruda marmovego aroganta ?
Kaj, dum l' atako de l' sovaĝaj ventoj,
Kaptantaj supre la barbarajn ondojn,
Rekurbigantaj la monstregajn kapojn,
Kaj, kun surdiga murmurego, ilin
Ekpendigantaj en glitantajn nubojn,
Tiel ke ja pro la bruega lukto
La Morto mem vekiĝas ? Ĉu vi povas,
Ho, Dormo partieca, doni vian
Ripozon al malseka maristeto
En horo tiel kruda ? dum en nokto
La plej trankvila kaj la plej kvieta,
Kun ĉiuj helprimedoj aldonataj,
Al reĝo vi rifuzas ĝin ? Feliĉa
Do, humilulo ! Malkviete kušas
La kapo kiu portas regan kronon.

Tradukis A.E.S.



Fervora Kokino.—En la vilaĝo Gaudersheim (Germanujo) oni aranĝis neordinaran feston. Oni honoris per ĝi unu...kokinon ; oni festis tiun gravan cirkonstancon, ke tiu kokino jus elmetis sian milan ovon.

En la domo de la mastro de la brava kokino, riĉe ornamita per flagoj, kolektiĝis la vilaĝanoj ĉirkaŭ giganta plado da ovajo, kaj, trinkinte ja la sano de la fervora "ovnaskistino," kolose festis kaj festenis.

Dume la kokino, enfermita en kaĝo en la ĉambro de la festenantoj, ŝajnis nenion scii pri sia honorigo, kaj ĝi indiferente eligis...mil-unuan ovon.—El *Juna Esperantisto*.

Council Meeting, B.E.A.

Held at the Offices of the Association on Monday, April 20, 1914. Present : Mr. H. B. Mudie (chairman), Messrs. P. Blaise, M. C. Butler, P. J. Cameron, H. A. Epstein, C. Evans, C. A. Fairman, A. Honeysett, H. Johnston, B. E. Long, Rhodes Marriott, A. Morrow, W. Phillimore, F. M. Sexton, A. Sharp, Col. W. A. Gale, Dr. J. Pollen, Misses M. L. Blake, L. S. Grant, M. R. Henningsen, C. M. Holmes, E. A. Lawrence, Ad. Schafer. In Attendance : Mr. G. Mercer Hollis, Mr. E. A. Millidge, The Secretary.

Organising Secretary.—The proposal of Col. Gale was discussed at great length, and a letter upon the subject was read from Mr. J. M. Warden. Eventually the matter was referred to the Executive Committee, with instructions to report at the next Council Meeting.

Mr. Gueritte's Lecture.—It was reported that Mr. Gueritte had generously forwarded to the Association 800 printed reports of his lecture and the discussion which followed. It was resolved that Mr. Gueritte be heartily thanked, and that copies be sent to the groups.

Minutes of Meeting of Executive Committee, held after the Council Meeting on April 20, 1914. Present : Messrs. P. J. Cameron, A. Honeysett, B. E. Long, F. M. Sexton, Dr. J. Pollen, Miss M. L. Blake. In Attendance : The Secretary.

Organising Secretary.—Col. Gale's project referred to this Committee by the Council was discussed, and the Secretary gave his opinion upon some of the advantages to be derived from the appointment of an organiser. The following resolution was passed :—

"That subject to an adequate increase in the total of the Guarantee Fund, the Executive considers that the re-organisation of the Secretary's duties and the appointment of additional clerical assistance would assist the Association's propaganda. The Executive considers that such re-organisation would involve an annual expenditure of not less than £120, of which £20 might be allocated from the Advertising Fund."



To Form New Groups.

Names and addresses of those *samideanoj* willing to help in the formation of New Groups are inserted under this heading.

Sydenham, London, S.E.—Mr. Henry W. Newbold, 42, Larkbere-road.

Richmond-on-Thames.—Mr. G. Badham, 80, Mt. Arrarat-road.

Wimbledon.—Mr. Henry Holden, 149, Queen's-road.

Bristol.—Mr. W. F. Westmancote, 142, Chessell-street, Ashton Gate (formerly secretary of Cheltenham Group).

Boy Scouts, Liverpool, N.—Scoutmaster Percy Edwards, 6, Woodland-road, Walton, Liverpool.

Streatham, London, S.W.—Mrs. A. Freke, 4, Mount Ephraim-lane, and Mr. E. A. Allsop, B.E.A. Office.

Dulwich, London, S.E.—Mr. E. A. Millidge, 33, Dovercourt-road, East Dulwich.

Earl's Court, London, S.W.—Babel House (Women's Industrial Training College), 96, Lexham-gardens.—Mrs. Bridges Adams at above address, or Mrs. L. A. Evans, 8, Bolan-street, Battersea.

East Finchley, London, N.—Mr. F. Baldwin, 44a, Sedgemere-avenue.

Kentish Town, London, N.—Mr. F. Gillman, 36, Countess-road.

The British Esperanto Association (Inc.). CANDIDATES FOR MEMBERSHIP.

EXTRACT FROM RULES.—“If no objection shall be lodged within fourteen days, the Secretary shall inform the candidate that he is admitted as a member.”

BERTIE F. BROWNE, 17, Hart-street, London, W.C.; Miss F. E. McCORMICK, 54, Gloucester-street, Toronto, Canada; Miss A. R. MOFFAT, Daisy Bank, Gilbert-road, Habe, Cheshire; Mrs. E. C. LUCAS, B.Sc., 1, Airedale Cliff, Bramley, Leeds; J. A. H. SMITH, 56, Whitehall-park, London, N.; Mrs. K. T. SMITH, 56, Whitehall-park, London, N.; A. E. STYLER, 1, Silverdale-road, Eastbourne; S. H. TAYLOR, 2, Arthur-road, Holloway, London, N.; ALEXANDER WALKER, Mount Gambier, S. Australia.

NEW FELLOWS.

Miss C. JENKINS, Liverpool; W. F. WESTMANCOTE, Bristol.

PASSED PRELIMINARY EXAMINATION.

Police-Constable THOMAS ANDERSON, Edinburgh; *P.C. ALEXANDER CAMERON, Leith; P.C. ALLAN CAMPBELL, *Sergeant ALEXANDER DUNCAN, *P.C. JOHN FORBES, *P.C. GEORGE FINDLAY, *P.C. JOHN GRAY, *P.C. JOHN HAMILTON, *P.C. MURDO MACLEOD, P.C. JOHN SHEED, *Sergeant DUNCAN SINCLAIR, *P.C. WILLIAM SINCLAIR, *P.C. JOHN STOBIE, ROBERT FRENCH, Edinburgh.

*Miss M. A. MURRAY, *GEORGE STUART, *Miss ANNIE WARDEN, *Miss J. K. MACPHERSON, *JAMES ALEXANDER, *Miss E. A. HENDERSON, *Miss A. J. LAWSON, *JOHN GUNN, *Miss MINNIE CHRISTISON, MRS. JEANNIE MENZIES, Mrs. K. S. M. WHYTE, Miss E. L. JONAS.

Miss J. MCINTOSH, Miss A. ELLISON, HORACE TIDSWELL, Miss E. MCKAY, Miss M. WALLS, Southport; *Miss M. F. MOORE, Miss R. M. LEACH, Norwich; *GEO DICKINSON, *Miss C. DICKINSON, Leith; *Master R. H. RIDER, *H. J. RIDER, Norwich; Mrs. E. J. MACHIN, Miss M. M. MATHEWS, *FRANK H. LOCKYER, Miss R. APPLEBAUM, Liverpool; Miss J. YOUNG, Mrs. M. SCHMIDT, *K. KLESTROW, D. RUSSELL, Glasgow; *A. W. THOMSON, Bexley Heath; *F. H. NAYLOR, Abbey Wood; Mrs. A. M. JAYNE, Charlton, London; C. W. CROFTS, Mrs. E. M. CRISP, Plumstead, London; T. J. EVANS, *Miss K. HARRIS, Pontsticill; *Rev. D. B. JONES, Penydarren; Miss F. H. BELL, J. C. CLIFFE, J. R. DUXBURY, *T. R. OPENSHAW, Blackburn; P. CLAYTON, E. DEPLEDGE, Halifax; *J. V. MIDGLEY, Cleckheaton; Master G. A. MORRIS, Merthyr Tydfil.

PASSED ADVANCED EXAMINATION.

*Miss AGNES ADAMS, *HERBERT APPLEYARD, *Miss C. J. THOMSON, Miss A. E. FORBES, MICHAEL HERON, Miss M. A. G. KING, Miss JESSIE LECKIE, Rev. C. F. CHASE, Miss M. J. PRINGLE, Miss J. F. TAIT, Edinburgh.

Miss C. SAVAGE, Wilpshire, nr. Blackburn; COLLINSON SLATER, *ERNEST FLINT, *HARRY FLINT, Miss ADA MATHERS, Blackburn; Miss ADA GREENWOOD, Miss M. STOTT, *FRED. PARKER, Miss M. KERSHAW, Miss D. WILD, Miss E. SINGLETON, Miss ADA ROBERTS, Miss A. DIXON, Burnley; Miss A. M. SMITH, Southport; Miss A. BRINDLEY, Plumstead, London; R. HOLDER, Charlton, London; *Miss K. G. BEACH, Stoke Newington, London; *S. H. TAYLOR, Holloway, London; E. K. JAYNE, Charlton, London; F. H. BRISCOE, Bowes Park, London; *G. J. WORTHINGTON, Leek, Staffs.

* Denotes that the candidate has passed with distinction.




Delegate Councillors.

London Esperanto Club.

H. D. Akerman.
J. Bredall.
P. J. Cameron.
H. A. Epstein.
Miss L. S. Grant.
Robert Robertson.
Miss J. Wynter.

To take the place of those named in the last Annual Circular.



Council and Executive Meetings, B.E.A.

Notice is hereby given that the next meeting of the Council will be held on Monday, May 18th, at the Offices of the Association, 17, Hart-street, London, W.C., at 6.30 p.m.

A Meeting of the Executive Committee will follow the Council Meeting.

The following Meeting of the Council will be held on Monday, June 1st (after the Annual General Meeting), at the Y.M.C.A. Hall, Sheffield.

H. CLEGG, Secretary.

Guarantors, 1914.

Acknowledged in April B.E. £4.040	Hill, Clement, St. Leonards-on-Sea ... £10	Purvis, Miss D. V., London, S.E. ... £10
Applebaum, J., Liverpool ... 10	Inman, Miss Z. A., Halstead ... 10	Robertson, Robert, London, N. ... 10
Beveridge, Rev. J., Fossoway ... 10	Jones, H., Swansea ... 10	Strong, F. J., Buckfastleigh, Devon ... 30
Boord, Miss H. E., London, W. ... 50	Lely, G. P., Beckenham ... 10	Tedman, C., Nagpur, India ... 20
Clark, G. F. H., Wynberg, S. Africa ... 20	Lockington, A. H., Bristol ... 10	Tredgold, R. R., London, S.E. ... 20
Crofts, Freeman W., Coleraine ... 10	Middlemiss, C. S., Calcutta ... 20	Walker, Rev. S. R. M., London, S.E. ... 10
Ford, James, Edinburgh ... 10	Millidge, E. A., London, S.E. ... 20	Wight, Elgar, London, S.E. ... 20
Fryer, Miss Annie, W. Didsbury ... 20	Morgan, A. J., Coventry ... 10	
Gibson, Fred., Todmorden ... 10	Neale, Walter G., Dublin ... 10	
Goodliffe, F. A., Letchworth ... 50	Pointer, Mrs., St Neots ... 10	Total ... £4,470



Fako de Korespondado Internacia (F.K.I.).

Sub tiu ĉi rubriko oni empresas malgrandajn anoncojn de tiuj el niaj legantoj, kiuj deziras korespondadi kun alilanduloj. Ĉiu anoncanto devas pagi ses penceojn (25 spesdekojn) por trilingva empresajo kiel sube (pli ol tri linioj po tri pencej por ĉia komencita linio); ĉiu MEMBRO de la Asocio havas la rajton fari unu empresajon senpage. Bonvolu skribi legeble, rekte al la Redakcio.

447. Berlin-Weisensee (Germanujo).—S-ro M. Kleineidam, Goethestr. 13, deziras interŝangi ilustr. poštartojn kun la tuta mondo, nepre tuj respondos. (114)

449. Le Mars (Iowa), U.S.A.—D-ro Charles D. Ray deziras interŝangi il. poštartojn kun alilandaj samideanoj. Ĉiam respondos. (114)

463. Haslingfield (Cambs.) Anglujo.—S-ro Wm. Thorne, Lernejestro, Haslingfield School, deziras rekomenci korespondadon kun alilandaj samideanoj. (x)

464. Praha (Bohemujo) Aŭstrio.—S-ro Karel Straka, Strašnice, interŝangas p.k. il. kaj p.m. Ĉiam tuj respondos.

495. Peterburgo (Rusujo).—S-ro Bazilo Nikiforov, Nevskij, 110, loĝejo 3, 14-jara, servisto en vegetara manĝejo, deziras korespondadi.

496. Zarnowiec (gub. Kielecka) Rusa Polujo.—S-ro Venčeslav Franczurowicz deziras korespondadi kun alilandaj samideanoj.

497. Dublin (Irlando).—S-ro Charles P. Blackham, 14, Garville-avenue, Rathgar, deziras korespondadi kun fremdlandaj samideanoj pri golfludado en diversaj landoj. (x)

498. Pañagala N. (Ceylon).—Fino D. Jerome Milanius deziras interŝangi il. p.kartojn kaj fotografajojn kaj korespondi letere en la Esperanta, angla kaj franca lingvoj kun gesamideanoj. Ĉiam tuj respondos. (x)

499. Vezo (gub. Estlando) Rusujo.—S-ro B. Roopa deziras korespondadi pri filozofio kaj interŝangi il. poštartojn (artaj kopioj).

500. Sheffield (Anglujo).—S-ro A. E. Rose, 171, Sutherland-road, deziras korespondadi kun ĉiulandaj gesamideanoj per ilus. p.k. Ĉiam respondos.

501. Cottbus (Germanujo).—S-ro G. Gehrmann, Hainstrato 6, deziras korespondi per p.k. il. aŭ letere.

502. Cottbus (Germanujo).—S-ro Rich. Petsche, Breitestr. 3, deziras interŝangi ilustritajn poštartojn kaj korespondi letere, ĉiam kaj tuj respondos.

503. Stuttgart (Germanujo).—S-ro Oskar Gunther, Bahnhofstr. 23, deziras interŝangi ilus. p.k. kun ĉiulandaj gesamideanoj, nepre tuj respondos. (x)

504. Padham (nr. Burnley) Anglujo.—S-ro Richard Bracewell, 31, Grove-lane, deziras korespondi kun alilandaj samideanoj. (x)